

Usona **Esperantisto**

Bulteno de Esperanto-USA - Nº 2025:2

A close-up portrait of Christopher Johnson, a man with a beard and mustache, smiling. He is wearing a blue jacket. The background is a blurred red building with white windows, some of which have red crosses.

De interne

Christopher Johnson ĉe Printempa Esperanto-Renkontiĝo (PER), fotita de Quintyn Bobb

Anoncoj **p.3**

Gravaj informoj pri la balotilo • Internacia Retradio • Bookmark Contest Results • Muzikamantoj, helpu nin! • Kontaktprojekto pri Tutvivaj Membroj • ESF Donation Matching • IJK 2025 • AMO-seminarioj je dispono al ĉiu • Internacia Tago de Familioj • Language Rights • Papecon transprenis usonano

Redakciaj rimarkoj **p.10**

de la redakcio • Lua HALL, Alena ADLER

Rimarkoj post la unua deĵora jaro de la nuna redakcio.

Ĉiutagaj funkcioj de la Centra Oficejo de Esperanto-USA **p.11**

de la centra oficejo • Amanda Higley SCHMIDT

La ĝenerala direktoro detalias la spektron de taskoj kaj respondecoj, kiujn ŝi havas ekde la komenco de sia deĵoro antaŭ proksimume unu jaro.

Mar-May Board Activity **p.15**

de la estraro

Summary of board meeting minutes for March through May, 2025.

Krucvortenigmo: Hans-Paulige **p.16**

enigmoj • Kartero WILLIAMS

La bultenaj krucvortenigmoj revenas!

De la kasisto **p.18**

Matt BROOKS

2025 K1 Financa ĝisdatigo • Financa terminaro, parto 2

Kial Burno? **p.20**

facila teksto • Ruth "Margo" KEVESH-COHEN

Kiel plej bone nomi la ĉeĥan urbon Brno, hejmon de la Universala Kongreso ĉi-somere, en Esperanto?

Raporto de Printempa Esperanto-Renkontiĝo 2025 **p.21**

kongresaj raportoj • Christopher JOHNSON

Se vi ankoraŭ ne spertis Printempan Esperanto-Renkontiĝon, legu, kiajn aventurojn vi maltrafis en la ĉi-jara!

La idioto **p.22**

media hits • Brandon SOWERS

Legu, kiel Esperanto aperis en Pulitzer-nomumita romano el 2017 de Elif BATUMAN.

Pli forta komunumo kun esperantista identeco kiel celo **p.23**

eseo • Bill MAXEY

Inspirita de artikolo en *Literatura Foiro*, Bill MAXEY rakontas pri la evoluanta Esperanto-komunumo kaj kiel flegi ĝin efike kaj aŭtente.

La vivo de Peĉjo **p.24**

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La tridek-sesa en serio de Timothy BORONCZYK.

Centvorte **p.25**

Baldaŭ eldoniĝos nova libro *Centvorte*, verkita de Jorge Rafael NOGUERAS! Ĝi konsistas el centvortaj mikronoveloj kaj aliaj premiitaj verkoj liaj. Jen reklamo kun iuj informoj, kiun komplementas recenzo de Bill MAXEY.

Ingo **p.26**

senintenca esperantaĵo • Alison WITHONEL

... el kiu oni prenas la bongustaĵojn.

Mikronoveloj **p.27**

Timothy BORONCZYK, Alena ADLER, Su Fidler COWLING

La centvortaĵoj revenas al *Usona Esperantisto* post printempa paŭzo!

Karlo Pov ne plu kongresas kun ni **p.28**

omaĝoj

La usona esperantisto Charles POWER, akk Karlo Pov, lasis nin la 2-an de Aprilo post longa malsano. Jen kolekto de panegiroj de liaj amatoj kaj kolegoj, kiuj rakontas lian mirindan historion kiel de aktiva movadano kaj de kulturita klerulo, plena je amo por la mondo.

Anoncoj

Gravaj informoj pri la balotilo

[EO] Ni informas vin, ke nova balotilo estas nun disponebla por nia ĉiujara balotado. Tiu, kiun vi ricevis la 30-an de Majo, estas misordigita kaj NEVALIDA. Bedaŭrinde, se vi jam voĉdonis uzante tiun, ankaŭ via antaŭa voĉdono estas NEVALIDA, kaj vi devos denove voĉdoni per la nova ligilo. Tial: membroj, kiuj volas partopreni, devas voĉdoni per la nova balotilo, eĉ se ili jam sendis voĉdonon.

Per la nova balotilo membroj nun povas voĉdoni por malpli ol du kandidatoj laŭvole, kaj eblas sindeteni por demandoj. Krome, la ordo de la kandidatoj nun estas hazarda.

Kiel antaŭe, la reta balotado daŭros ĝis merkredo, la 7-a de julio, je noktomezo orienttempe.

Ĉi tiu ŝanĝo rilatas nur al la reta balotilo. Se vi voĉdonis, aŭ planas voĉdoni papere per *Usona Esperantisto* 2025:1, via baloto estos valida. Memoru, ke se vi sendas vian voĉdonon KAJ papere KAJ rete, nur la reta baloto validos.

Ni pardonpetas pro ajna eventuala konfuzo aŭ ĝeno. Se vi havas demandojn, ne hezitu kontakti nin.

Vi baldaŭ ricevos retmesaĝon de *Simply Voting* kun ligilo al la nova baloto. Se vi ne ricevas ĉi tiun retmesaĝon, bonvolu kontroli vian spam-dosierujon, kaj se vi ankoraŭ ne trovas ĝin, bonvolu kontakti nin.

Important Information About the Ballot

[EN] We'd like to inform you that a new ballot is now available for our annual election. The one you received the 30th of May was not configured correctly and is therefore INVALID. Unfortunately, if you've already voted using that one, your previous vote is also INVALID. Therefore: members who wish to participate must vote using the new ballot, even if they've already voted.

With the new ballot it is possible to vote for fewer than two candidates if desired, and to abstain from questions and have the abstentions counted. Additionally, the order of candidates is now random.

Just like before, online voting will end on Wednesday, July 7th at midnight ET.

This change relates only to online ballots. If you've voted or plan to vote using the paper ballot sent in *Usona Esperantisto* 2025:1, your vote will be valid. Remember that if you vote both using the paper AND the online ballots, only the online one will count.

We apologize for any possible confusion or inconvenience. If you have questions, don't hesitate to contact us.

You will receive an email shortly from Simply Voting with a link to the new ballot. If you do not receive this email, please check your spam folder, and if you still do not find it, please contact us.

IRo: Internacia Retradio

Ĉi tiu mesaĝo, iomete adaptita por *Usona Esperantisto*, aperis en Telegramo de Muzaiko.

Saluton! Mi havas mojosan informon por vi ĉiuj, samideanoj! Ekde la 29-a de Majo ekzistas alia nova radio en Esperanto, kiu, malkiel Muzaiko, dissendas informojn.

Jen ligilo al nia retejo:
<https://internaciaretradio.wordpress.com/>

Temas pri la Internacia Retradio, IRo, kiu la tutan tagon elsendos programojn tute en nia kara lingvo.

La semajna novaĵbulteno estos enondigita ĉiutage je la 8-a kaj 20-a horoj UTK, kaj estos ankaŭ havebla podkaste. Dum la resto de la tago, vi tamen povos daŭre aŭskulti nian fluon de pasintaj elsendoj, tamen buntaj kaj bonkvalitaj. Ne temas pri konkurenco al Muzaiko, sed pliriĉiĝo de la esperanta radia spektro. Ĝuu do simple!

Ĝis do por niaj unuaj novaĵoj!

Bookmark Contest Results

Karlo GERMANY

The Bookmark Contest has come to a close and we have chosen our winners! I have the honor to present to you the top three winners from the 12 entries submitted. This was open to persons of all countries and we had an international cast of winners.

I hope you enjoy viewing the winning bookmarks as much as I enjoyed being able to chair this contest!

Bookmark Judging Process

I sent images of all of the bookmarks, without revealing names and emails of the entrants, to our three judges Myrtis Smith, Andy Blair and Evie Liu. They were responsible for choosing the three bookmarks they liked the best. From that, I was able to choose two winners — all the judges liked the bookmark that won first place and two judges liked the second place bookmark. Unfortunately, because no other bookmark was selected more than once by the judges, we had to have a tie breaker for third place. I took two of three bookmarks selected by the judges and sent them back for another vote. That broke the tie for the third place bookmark.

First Prize and the winner of \$250 is:

Abigael Jepkorir from Eldoret, Kenya for the “Butterfly Bookmark”! Abigael is 29 years old and learned about Esperanto in February 2024. She was also elected president of the Women’s Esperanto Association in Kenya. She is still enthusiastically studying the language online using YouTube, audio and paperbacks.

Second Prize and winner of \$150:

Isack Kipkirui from Nairobi, Kenya for the “Flower Bookmark”! Isack is a graphic designer, video editor, and a passionate beginner in Esperanto. He says that he is discovering “a new world and a deeper connection to others” in his Esperanto studies. He writes that “Step by step, I am building fluency and confidence.”

Third Prize and winner of \$100:

Last and certainly not least, **Rachel Canavese** from Alameda, California for her “Faces Bookmark”! She is 16 years old and lives with her parents, cat, dog, and baby chicks. Her sister taught her Esperanto five years ago. In her spare time, she likes to run and read.

Acknowledgements

First and foremost I would like to thank Chuck Mays for his assistance and support while organizing and planning many of the details. I’d also like to thank my other fellow members of the Promotion Committee — Will Morton and Murray Merner — for their help and input in organizing the contest. I am also very proud of the work of our three judges Myrtis Smith, Andy Blair and Evie Liu. Lastly, thanks to Amanda Schmidt for her suggestions and for helping the winners get paid.



Speciala premio: elekto de la Centra Oficejo

Esperanto USA Bookmark Design Contest



FRONT

BACK

Ni estis tre kontentaj vidi la diversajn dezajnojn por libropaĝmarkiloj, kiujn ni ricevis kadre de la konkurso! Estis pluraj, kiuj estis interesaj kaj belaj. Kiam ni konsideris ĉiujn, unu elstaris al ni kiel tiu, kiu plej bone reprezentas nian asocion. Ni decidis, ke tiun dezajnon ni produktos kaj komencos distribui, kaj por ankaŭ danki al la kreinto, ni aljuĝis specialan aldonan premion, “Elekto de la Centra Oficejo”, kun valoro de \$250 USD.* Tiu premio estas aldona al la tri menciitaj en la raporto de Charles Germany.

Ni presos libropaĝmarkilojn kun tiu dezajno loke en Toronto, kaj distribuos ilin unue dum la Dulanda Kongreso, kie eblos akiri plurajn, por ke via klubo disdonu ilin ĉe “*Little Free Libraries*”, ĉe kulturaj festivaloj, aŭ kiel ajn plaĉas al vi. Ni ankaŭ distribuos dum la Movada Foiro kadre de la UK en Burno, kaj (se restos) aldonos al mendoj de la libroservo, aŭ eventuale vendos arojn. Ni ja kredas, ke la publiko tre ŝatos la dezajnon, kaj ke la libropaĝmarkiloj baldaŭ elĉerpiĝos!

La kreinto de la dezajno estas Anne SCHILL, de Mountain View, Kalifornio. Dankon al Anne!

*La originala buĝeto de la projekto planis \$500 por presado de la libropaĝmarkiloj. Ni reduktas la presbuĝeton al (maksimume) \$250 por la unua presado, tiel ke la fina buĝeto restos egala. Se la libropaĝmarkiloj estas furoraj, ni povos poste presi denove!

Muzikamantoj, helpu nin!

Alena ADLER

Karaj legantoj! Ni ĉi-kvaronjare ricevis peton de nova esperantisto — muzikisto — kiu deziras trovi kantolibrojn en Esperanto. Ni petas helpon de muzikamaj samideanoj, trovi rimedojn por helpi lin. Kantolibroj en Esperantujo ofte publikiĝas private, kadre de lokaj grupoj, kaj eble ne konatiĝas ekster la urbo aŭ regiono. La retejo *kantaro.ikso.net* enhavas ege multajn kantotekstojn, sed tre granda plejparto estas sen partituro, kaj multegaj sen akordoj. Se vi povas rekomendi ajnajn helpilojn por muzikisto, kiu komencas engaĝiĝi pri Esperanto, ni petas ke vi skribu al ni: bulteno@esperanto.org.

En miaj plej aŭdacaj esperoj, ni ricevos tiom da respondoj el ĉiu regiono, ke ni povos arigi bonan rimedoliston kaj disponigi ĝin al ĉiuj!

Kontaktprojekto pri Tutvivaj Membroj

[EO] Hej, membroj! Ĉu vi povus helpi al la Centra Oficejo kaj la Membreca Komitato pri nia projekto? Ni penas kontakti ĉiujn niajn Tutvivajn Membrojn kaj ĝisdatigi iliajn kontaktinformojn, por ke ni povu sendi al ili niajn novajn Atestilojn de Tutviva Membreco. Ni ne sukcesis kontakti la subajn Tutvivajn Membrojn. Se vi konas ilin aŭ havas ajnajn informojn pri ili, bonvolu kontakti kun la CO ĉe amanda.schmidt@esperanto-usa.org. Se vi scias, ke ili estas mortintaj, ankaŭ tion ni ŝatus scii. Ni tre aprezas la helpon!

Life Member Outreach Project

[EN] Hey, members! Can you help the Central Office and the Membership Committee with our project? We're trying to get ahold of all of our Life Members and update their contact information so we can send them our new Life Member Certificates. We've been unable to contact the following Life Members. If you know them or have any info about them, please contact the CO at amanda.schmidt@esperanto-usa.org. If you know they are deceased, we'd like to know that, too. We very much appreciate the help!

* * * * *

Allen E. Foster, Punta Gorda, FL
Ann Bodine, MN
Charlotte Lasko, PA
Constance Walsh, NY
Edwin Hedges, KS
Eric Sperling, Dallas, TX
Ferdinando Anic, NY
Garry Cobbum, South Bend, IN
Gary Kent, CA
Halbert Walston, Radcliff, KY

James A. Lifer, Ashland, OR
Jay Sorensen, Bucharest, Romania
Joan A Young, North Bend, WA
John McLeod, FL
June Knudsen, Wilber, NE
Ken Price, Toronto, Ontario, Canada
Lorenzo Salmonson, Fairfield, IA
Lyle Evans, Blackburg, VA
Michael C. MacCannell, NY
Paul Stein, San Diego, CA

Pedro O. Bailon, CA
Peter K. Cook, Annandale, VA
Roy J. Shlemon, Newport Beach, CA
Russell J. Charles
Shawn Tiffany, Washington, DC
Thomas H. Booker, Green Valley, AZ
Tom A. Phoenix, Portland, OR
William M. Deary, Sr., FL
Zinovi Kurolap, Ontario, Canada

Donate to the Esperanto in the USA fund (Matched by ESF)

This is a reminder that the matching donations program through the Esperantic Studies Foundation (ESF) was renewed for 2025; ESF will match a total of \$5000 in donations earmarked for E-USA! When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the *Usona Bona Film-Festivalo*. They have also been used to print and mail diplomas for US Esperantists taking the KER exams, and to support US Esperantists attending Esperanto events abroad, among other things. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States!



<<https://mallonge.net/ESF-EUSA>>

IJK 2025 en Indonezio invitas vin!

Restas malpli ol du monatoj ĝis la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, kiu okazos de la 9-a ĝis la 16-a de Aŭgusto 2025 en Cisarua (Bogor), Indonezio.

La 81-a IJK estas la unua IJK kiu okazos en Indonezio, granda insularo en Sudorienta Azio konata pro ties kultura, ekologia, kaj lingva diverseco, kaj krome pro multaj lokoj proklamitaj kiel mondaj heredaĵoj de Unesko. La kongresa temo estas “Diverseco, solidareco kaj toleremo”, sub kiu okazos programeroj kiuj reliefigos la kuriozan kazon de diverseco en Sudorienta Azio kaj kion lerni de tiu diverseco. Dum IJK, tre specialan okazon kune prifestos kongresanoj: la 80-an datrevenon de la Sendependiĝo de Indonezio el Nederlando en 1945. Okazos buntaj kulturaj programeroj por elmontri la kulturan diversecon de Indonezio per tradiciaj dancoj, teatraĵoj kaj muzikaĵoj.

Kongresanoj povas nun aliĝi al abundaj opcioj de antaŭ-dum- kaj post-kongresaj ekskursoj, kaj krome komferte veturos inter la ĉefurbo Ĝakarto kaj la kongresejo, *Alfa Resort Hotel and Conference*, per niaj specialaj buskaravanoj. En la programo, atendas vin vasta gamo de lernigaj, interagaj, sportaj kaj distraj aktivaĵoj, taŭgaj por ĉiuj aĝoj, lingvoniveloj, kaj emoj. Krome, eblos ankaŭ KER-ekzameniĝi skribe pri la nivelo C1: al individuaj membroj de TEJO disponeblas repago de 20€. Individuaj kongresanoj ankaŭ povas proponi programerojn ĝis la **30-a de Junio**.

Ĝis nun aliĝis 140 homoj el 33 landoj, el kiuj plej multaj aliĝis el Indonezio (22), Japanio (12), Aŭstralio (12), kaj Ĉinio (8). Krom ili, aliĝis junuloj el aliaj landoj de Sudorienta Azio, ĉefe Filipinoj kaj Vjetnamio (po 7), Orienta Timoro (6), kaj Tajlando (2). Dum IJK 2025 vi certe profitos de la unika okazo konatiĝi kaj amikiĝi kun samideanoj el Azio kaj Oceanio, multaj el kiuj partoprenos sian unuan internacian Esperanto-aranĝon.

Mankas ankoraŭ kelkaj homoj por ke ni atingu nian sekvan mejloŝtonon: 150 partoprenantoj. Ĉu vi ankoraŭ ne havas planojn en Aŭgusto? Ĉu vi ŝatus sperti ion tute novan kaj mirindan? Eliru la rutinon, venu al Indonezio! Ne maltrafu ĉi tiun tre maloftan ŝancon por konatiĝi kun ĉi tiu mirinda lando, pere de Esperanto, kune kun esperantistoj! Neniam oni estas tro maljuna por partopreni en IJK; ĉiuj estas bonvenaj amuziĝi! Aliĝu dum la tria aliĝperiodo ĝis la 30-a de Junio.

La reta aliĝilo troviĝas ĉe <ijk2025.tejo.org/alighilo/>.

AMO-seminarioj: valoraĵoj je dispono al ĉiu

La renoma retejo de ILEI, prizorgata de Jozefo NEMETH en Hungarujo, ĵus aperigis la dek plej universale interesajn seminariojn de la programo pri Aktivula Maturigo (AMO) de UEA kaj ILEI en kunlaboro. Jen la teksto, kiel ĝi aperas en la retejo:

Jen aliro al la naŭ plej utilaj AMO-seminarioj plus unu EKO-komuniko pri kunsido el Bulgario, kiu havis ĉiun trajton de AMO-seminario.

EKO 15 2014 Bulgario: kunveno en Sofio kun FLAM-analizo.

AMO 16 2015 Svislando: Tria Tutmonda Konferenco

AMO 84: Daŭripovaj fervojaj kondiĉoj (kunlabore kun IFEF)

AMO 86: Pacifikaj fabeloj el Nov-Zelando, Aŭstralio kaj Tahiti.

AMO 87: Baltio – kiel progresi? Analizo per FLAM-analizo.

AMO 87: FLAM-analizo (pri la balta regiono por seminario en Klaipeda, Litovio).

AMO 92: Kubo: senĉesa agado

AMO 93: Eŭrazia Ekonomia Komunumo (kunlabore kun IKEF)

AMO 94: Pri vortfarado en Eo, el kroata seminario.

AMO 103: Virinoj en la Eo-movado

Ĉiuj ĉi troviĝas ĉe <ilei.info/agado/EKO-AMO.php>.

FLAM-analizo estas jen:

Fortoj: ene de la koncerna organizo

Lamaĵoj: ene de la koncerna organizo

Avantaĝoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo

Minacoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo

La FLAM-kuracilo estas EKEK, jen:

Evoluigi la Fortojn

Kuraci la Lamaĵojn

Ekspluati la Avantaĝojn

Kontraŭi la Minaco

Internacia Tago de Familioj

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj

La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Familioj estas “Familio-celaj politikoj por daŭripova evoluigo”. Per tiu temo, Unuiĝintaj Nacioj instigas registarojn de la mondo integri familiojn en siaj evoluigaj tagordoj por trakti gravajn temojn, kiel ekzemple teknologian transformadon, demografiajn ŝanĝojn, urbigon, migradon kaj klimatan ŝanĝiĝon.

Ĝenerale, familioj transdonas valorojn al novaj generacioj. Tiel ni bezonas, ke familioj transdonu valorojn kiel socian justecon, daŭripovecon, naturan konservadon, klimatan ekvilibron, kaj aliajn gravajn elementojn por nia komuna estonteco. Al tiu, ni aldonu, ke en sia eduka rolo, familioj konservas kaj disvastigas lingvojn kaj inspiras ilin al siaj infanoj.

Ekonomia evoluigo devas akompani tian socian evoluigon, tiel ke ni vere elradikigu malriĉecon, kaj antaŭenigu decan laboron kaj egalajn ŝancojn. Justeco kaj inkluzivo estas la ŝlosiloj por konstrui pli bonan mondon por ĉiuj. En tiu vojo, lingvoj gravas, ne nur por bone komuniki al la familioj de la mondo, sed, pli signife, por aŭskulti tiujn familiojn: lingvoj estas por paroli, sed ankaŭ por aŭskulti.

Mondaj registaroj devas aŭskulti la popolojn de la mondo, en tutmonda dialogo kun internaciaj organizoj,

neregistaraj organizoj, akademioj, kaj komercaj kaj civitanaj organizoj, por kunlabora agado. Neniu estu postlasita en nia tutmonda vojo al daŭripova evoluigo.

Per Esperanto, ni transdonas, ene de niaj familioj, kaj inter malsamaj familioj, la valorojn de solidareco, kompreno kaj estimo por aliaj popoloj. En pluraj renkontiĝoj tra la mondo, ĉiutage, parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto kultivas konfidon, toleremon kaj respekton. Ni unuiĝu por konstrui tiun pli bonan mondon por ĉiuj.

Prelegoj famili-rilataj dum la Dulanda Kongreso

- *Esperanto en la familio: spertoj de esploro el intervjuoj kun denaskuloj kaj gepatroj trans diversaj kontinentoj*
 - Stela BESENYEI-MERGER, Hungarujo
 - Dimanĉo, 13 Julio, 13h00-14h15 en la Internacia Ĉambro
- *Mia sperto denaskuligi miajn filinojn*
 - Amanda Higley SCHMIDT, Usono
 - Sabato, 12 Julio, 10h45-12h00 en ĉambro ILC 102

La tempoj kaj lokoj estas aktualaj je presotempo, sed kontrolu la horaron dum la kongreso por esti certa! Ni kuraĝigas homojn, kiuj havas intereson pri Esperanto kaj familioj, skribi al amanda.schmidt@esperanto-usa.org por dialogi pri la temo kaj pri eventuala eblo munti ĉi-rilatan Zoom-kunvenon aŭ SIG (*Special Interest Group*).

Language Rights — At the United Nations and Beyond

As the Study Group on Language and the United Nations prepares for its annual symposium on June 13, questions concerning language rights nationally and internationally continue to arise.

The New-York-based NGO Committee on Language and Languages met on February 28 to discuss indigenous language rights; and the right to education in the mother tongue was the topic of remarks by Prof. Francis M. Hult, chair of the NGO Committee, at a reception hosted by the Bangladeshi UN Mission to celebrate Mother Language Day on February 21.

The recent declaration by the U.S. President naming English as the national language of the USA will

undoubtedly stir debate at the joint US-Canada Esperanto Congress in Toronto (July 11-14) and has only sharpened anxiety on language issues in international contexts.

“Do Linguistic Human Rights Exist?” asked an online seminar organized by Dr. Michele Gazzola of Ulster University on April 10. The question echoed the title of a special issue of the journal *Language Problems and Language Planning* (LPLP). The journal, a leader in the field of sociolinguistics and language policy, was founded by Esperanto-speaking language specialists half a century ago to examine political and social relationships among languages.

Papecon transprenis usonano

De UEA pri papo Francisko

In a message to the public, UEA mourned the passing of “the great internationalist and humanist His Holiness Pope Francis ... the first Pope from the Americas, born in Argentina.” “Pope Francis was not only the leader of the Catholic Church,” the Association pointed out, “but also a worldwide voice for peace, justice, and ecological awareness – values especially important to internationalists and particularly to Esperantists, speakers of the International Language Esperanto.” “Pope Francis tirelessly defended the dignity and acceptability of all people – particularly the poor, immigrants, indigenous peoples, and the forgotten – and he encouraged dialogue across all barriers of diversity, culture, religion and ideology.” UEA, itself neutral on matters of religion, addressed its special condolences “to the Catholic community and to all people of good will, particularly the members of the International Esperantist Catholic Union IKUE and to the Esperanto team at the Vatican Radio.” Vatican Radio, the message pointed out has for decades broadcast in Esperanto. Also: “Several of the texts of Pope Francis have been published in Esperanto, among them *Laudato Si*, *Laudato Deum*, and *Ne timu, estas mi*, a collection of his writings on migrants and refugees.” The message pointed out that “as a polyglot and internationalist,” Pope Francis “spoke eight languages and understood the value of linguistic and cultural diversity.” The message added that “after his visit to Mexico in February 2016, Pope Francis was asked by a journalist whether he dreams in Italian or in Spanish. He replied: ‘I would say that I dream in Esperanto.’ The reply was symbolic: as far as we know, Pope Francis did not speak the international language Esperanto; but he was indeed a supporter of its ideals.” “An organization dedicated to

intercultural dialogue and sustainable development, UEA values highly Pope Francis’s contributions to a more peaceful and just world in which international solidarity is a core value. A true citizen of the world, Pope Francis, through his life and works, left an immeasurable legacy for all humankind. He brought hope to all – believers and nonbelievers alike. And hope was the essence of the message of another great humanist, the creator of Esperanto, Ludwik Zamenhof, who wrote hope into the very name of his language.”

De Duncan Charters pri papo Leo

La surpriza elekto de la unua usona papo naskiĝinta en Ĉikago, Robert Francis Prevost, kiel Papo Leo (Leono) XIV (14-a) estas ankaŭ kuraĝiga paŝo, ŝajne ebligita de lia konatiĝo kun la pli novaj kardinaloj de plej diversaj landoj nomumitaj de Papo Francisko. Liaj ducivitaneco (Usono kaj Peruo) kaj monda perspektivo, lia dekomenca insisto pri mesaĝo de paco kaj unueco kaj neakcepto de kontraŭhoma agado, aŭguras daŭrigon de la plej altaj aspiroj de lia antaŭulo. Aparte signifa por ni estas, ke kiel denaska parolanto de la angla lingvo, li elektis ne uzi ĝin en la unua publika apero, sed alparolis la publikon en la tradicia latina, la itala kaj la hispana, kiujn li alproprigis al si, kaj per kiuj li nature komunikas.

Ne estos facila rolo, sed ni havas la rajton esperi, ke lia elekto donos novan impeton al paco kaj unueco, kunlaborigado por tion atingi en la mondo, kaj ne malplej grave, konscio ke neinsisto pri prioritata uzo de la angla lingvo internacie indikas fundamentan respekton al la popoloj de la mondo kaj la egaleco de iliaj lingvoj kaj kulturoj.

(fine de anoncoj)

Redakciaj rimarkoj, UE 2025:2

de la redakcio • Lua HALL, Alena ADLER

Fieran Junion, karaj legantoj! Pasis pli ol jaro, de kiam ni prenis la stafeton kaj komencis redakti la bultenon *Usona Esperantisto*. Ni renovigis ĝian paperan aspekton kaj poluris nian procedon; nun ni turnas nian atenton al administraj plibonigoj.

Pri limdatoj

Laŭstatute, la bulteno (aŭ “organo”) devas aperi ĉiun kvaronjaron. Tamen pro tempostreĉoj, la plena numero 2024:4 ne aperis ĝis Januaro, 2025 — kio estis konvencio tiam, kiam aperis ses numeroj jare. Nun ke ĝi aperas nur kvarfoje, tio estas ne nur teoria statuta problemo, sed ankaŭ efektiva ĝeno al la librotenado de la Centra Oficejo.

Tial ni alĝustigas la kalendaron,¹ por ke ĉiu numero aperu en sia koncerna jaro. Tio kaŭzos, ke ĉiu numero aperos iomete pli frue en la jaro; ni kredas, ke vi ĝojos legi la mezjaran numeron ĉe la someraj kongresoj, kaj la jarfinan numeron ĉirkaŭ la vintraj festoj.

Tamen, la ĝustaj datoj estos fiksitaj en 2026. La redakcio penas konstati, ĉu necesas pli da tempo inter la publika limdato kaj la dato, kiam la numero devas esti prespreta — aktuale du semajnoj. Ni ne povas bone juĝi tion, ĉar ni apenaŭ spertis ‘normalan’ laborperiodon ĝis nun; 2024:1 koncernis trejnadon, 2024:3 estis severe prokrastita pro uragano Helene,² 2024:4 devis esti malgrandigita por korekti la kadencon post tio, kaj ni suferis kripligajn teĥnikajn problemojn dum 2025:1.

Tiujn ni ne prezentas kiel ekskuzojn (kvankam tiel forta uragano estas eble sufiĉa ekskuzo); iom post iom ni plibonigas niajn labornormojn, por ke la procedo fariĝu pli kaj pli glata. La rezulto estu pli fleksebla redakcia teamo, kiu povu minimumigi la ĝenon de neantaŭviditaĵoj. Ĉi-jare ni atentis, ĉu niaj plibonigoj rezultigas ankaŭ pli stabilan kadencon.

Kiel ĉiam, por maksimumigi la ŝancon, ke viaj verkoj estos konsideritaj por la koncernata numero, sendu ilin al *Usona Esperantisto* pli frue ol la limdato, kaj atentu oficialajn komunikojn pri limdatoj de sekvaj numeroj.

Pri la retejo

Ni menciis teĥnikajn problemojn dum 2025:1, kiuj temis pri neatendita misfunkcio de la retejo. Ni feliĉas diri, ke ĝi estas nun tute solvita por la antaŭvidebla estonteco. Tamen la retejo, kaj la programaro kreita por ĝi de la antaŭa redaktoro HOSS FIROOZANIA, estas teĥnike komplikaj. Ili plaĉegas al duono de la aktuala redakcio — Lua, kiu

estas programisto samkiel Hoss — sed por ke Alena kaj Lua povu egale prizorgi la retan version de la bulteno, tio postulus multe da kuntrejnado kaj do tro da tempo.

Delonge ni diskutas kun la ĝenerala direktoro kaj iuj estraranoj pri la ebleco movi la retejon al *WordPress*, kio estas celo por 2026. Ajnan movon ni devos entrepreni prudente, por konservi nian arĥivon — trezoron tre gravan al la organizo, konsistantan el usonaj periodaĵoj depost 1906. Krome, tia movo postulos trejnadon por ambaŭ ni, sed ni kredas, ke *WordPress* estas sistemo malpli komplikita kaj pli facile lernebla. Nia deziro estas ke ambaŭ redaktoroj povu individue plenumi ĉiun ajn taskon en la procedo, okaze de krizo, kiu malhelpas unu el ni. Pli stabila sistemo, regebla kaj mastrumebla de pli da homoj, helpas ankaŭ estontajn redaktorojn.

Antaŭvideble tio portos ŝanĝojn al la aspekto kaj organizo de la reta versio de *Usona Esperantisto*. Ni bonvenigas komentojn pri tio, kiel ni povas plibonigi ĝin!

Pri artefarita intelekto

Antaŭ jaro, ni petis opiniojn pri uzado de artefarita intelekto (AI) en *Usona Esperantisto*. Efektive ni ricevis du komentojn, ambaŭ de regulaj kontribuantoj. Manke de multaj respondoj por konsidero, la redakcio krome atentis diskutojn de aliaj esperantistoj, ekzemple ĉe retbabilejoj, sociaj retejoj kaj aliaj periodaĵoj.

Rimarku, ke *Usona Esperantisto* iagrade uzas AI-on en preskaŭ ĉiu numero ekde kelkaj jaroj, por la bildoj akompanantaj la mikronovelojn, se aŭtoro ne mem provizis unu. Krome, ni publikigis almenaŭ unu artikolon kreitan de AI,³ kvankam ĝi estas satiro; kaj ni ne konstatis, ĉu aliaj submetitaĵoj estis kreitaj helpe de AI.

Lastatempe tamen, AI fariĝis multe pli polemika dum ĝia adoptiĝo kreskas. Fundamentaj demandoj leviĝas pri tio, kian valoron donas AI kaj kiajn valorojn publikaĵo volas enteni. Nia opinio, delonge estas tempo, ke *Usona Esperantisto* havu oficialan politikon, por bone komuniki al aŭtoroj kaj al legantoj, kion ili atendu.

La temo estas tamen tiel vasta, profunda kaj ankoraŭ disvolviĝanta, ke ni ne povas ampleksi ĉiun konsideron inter tiuj ĉi rimarkoj; ni esperas dividi nian kompletan rezonadon en alian artikolon por estonta numero. Ni rezervas ĉi tiun spacon por komuniki simple niajn pensojn kaj opiniojn ĉi-teme.

Per *Usona Esperantisto* la redakcio esperas plenumi interalie du celojn:

1. kuraĝigi usonajn esperantistojn verki en Esperanto, kaj tiel streĉi sian kapablon esprimi sin per Esperanto;
2. havigi legindajn verkojn en kiom eble plej altkvalita Esperanto, aparte de — aŭ por — usonaj esperantistoj.

Sekve de tio, la ĉefparto de ajna verko, destinita al la bulteno, devas esti principe la produkto de homa laboro.

Nin forte impresis la opiniartikolo de Jordan ZERO en *Lumo* 2025:1-2,⁴ aparte ĉi tiu frazo: “*La malfacileco de la esperantista defio konvinki iun lerni la lingvon multobliĝus, se la esperantistaro eĉ ne mem uzus la lingvon.*” Ni propre esperas ĉesi uzi AI-on, kaj jam malfermis al ni aliajn rimedojn por nia sola ekzistanta uzado, suplementi bildojn al mikronoveloj.

Kadre, rimarku, ke laŭ la statuto, organizaĵ materialoj inkluzive de la bulteno liveru “informon pri la stato kaj progreso de la organizaĵo kaj ĝia membraro” (§206), kaj aparte la liston de estraraj kandidatoj ĉiujare (§404). Krom tio, materialoj aperontaj en la bulteno estas elektitaj laŭ la

redakcio, konsile de la prezidanto kaj estraro laŭnecese (§1103). Dum nia deĵoro, ni disvolvos AI-konsciajn konvenciojn iom post iom pri tio, kiajn verkojn ni intencas elekti; sed kiel ĝenerala inklino, ni esperas minimumigi, eĉ nuligi, la uzadon de AI kiel eble.

Fino

Dankon pro via daŭra subteno al *Usona Esperantisto*! Estas ĝojo kaj honoro, ke ni povas servi la usonan esperantistaron ĉi tiel; ni esperas servi ankoraŭ dum jaroj plu. Eĉ internaciaj esperantistoj legas nian bultenon pli kaj pli, kaj ni strebas liveri al la tuta Esperantujo legindan periodaĵon. Apartan dankon al ĉiuj niaj aŭtoroj, de kies malavara laboro la bulteno esence dependas. Fine, dankon al la membraro kaj estraro de E-USA, kiuj ebligas al ni ĉi tiun laboron per siaj subteno kaj gvidado.

1. <bulteno.esperanto-usa.org/kolofono/kalendaro/>
2. <bulteno.esperanto-usa.org/a/2024/03/redakcio/>
3. <bulteno.esperanto-usa.org/a/2024/01/goljat/>
4. “Ne inundu Esperantujon per AI-kreaĵoj!”, Jordan Zero, *Lumo* 2025:1-2, p.55

Ĉiutagaj funkcioj de la Centra Oficejo de Esperanto-USA

de la centra oficejo • Amanda Higley SCHMIDT

Saluton karaj membroj de Esperanto-USA!

Tiu ĉi artikolo estas por vi. Mi volas informi vin pri la ĉiutagaj taskoj de la Centra Oficejo (CO), ke vi havu klaran bildon pri la funkciado de nia organizo. Antaŭ ol mi ektrejniĝis kiel la nova ĝenerala direktoro, mi havis nenian ideon, kion ekzakte faras la Centra Oficejo — kvankam mi estis membro de Esperanto-USA dum kelkaj jardekoj, voĉdonis en la balotadoj, partoprenis multajn Landajn Kongresojn, ktp. Mi sciis, ke oni funkciigas libroservon, kaj respondas al retroŝtoj kaj telefonvokoj... sed kion alian la CO faras...?

Kiam oni dungis min en Januaro 2024, mi tute ne sciis, kion ekzakte mi farus. Dum mia ses-monata trejnperiodo kun Vilĉjo HARRIS, kies deĵoro daŭris 16 jarojn (2008–2024), mi lernis multe. Post plene transpreni la rolon en Julio 2024, restis la kutimaj CO-taskoj, sed ankaŭ aperis multaj novaj taskoj pro la CO-translokiĝo de Majno al Kalifornio. Ofte venas novaj taskoj ankaŭ pro la pli aktiva agado de la estraro ekde 2023, kiam Brandon SOWERS prezidantiĝis. Nun, post proksimume unu jaro da deĵoro, mi ĝojas rakonti al vi detale ĉion, kion faras la Centra Oficejo.

Miaj taskoj estas tre diversaj: administraj, financaj, strategiplanaj, membro-rilataj, komitatmastrumaj, kongresplanaj, libroservaj, kunvenaj, protokolo-kontrolaj, bultenaj, UEA-rilataj, kaj multaj aliaj. Plej laste, sed certe ne malplej grave: retroŝtaj taskoj! Mi ĉiutage legas, organizas kaj respondas almenaŭ 50 retmesaĝojn de ĉiuj niaj membroj, kunlaborantoj, organizoj kaj instancoj, kiuj rilatas kun nia organizo. Mi devas konstante mastrumi kaj organizi la retroŝtkestojn kaj klopodi konservi ĉion en bona ordo, laŭ prioritato.

Ne eblus rakonti detale pri ĉiuj miaj taskoj, sed sube mi rakontos pri la plej gravaj aŭ interesaj. Ĉiam estas pli da taskoj ol eblas plenumi; mi neniam trovas la finon! Konstante necesas prioritati ilin laŭ urĝeco: altprioritataj, mezprioritataj kaj malaltprioritataj. La plejmulto estas nur de mi fareblaj, almenaŭ dum mi restos la nura dungito. Pasintsomere, ni dungis staĝanton, Madalena, 18-jaran aktivan esperantiston ĵus diplomiĝintan de sia gimnazio; ŝi multe helpis min starigi nian novan retbutikon. Ŝi katalogis ĉiujn librojn, kiujn Vilĉjo sendis (ok skatolojn, se mi ĝuste memoras!) kaj konstatis iliajn prezojn kaj haveblecon ĉe aliaj libroservoj, inkluzive de Amazon, por helpi min decidi pri niaj

libroprezoj. Ĉi-somere, Madalena denove helpas min, kaj ankaŭ niaj kongresaj stipendiatoj helpas pri kongresaj taskoj.

Krome, kompreneble, ankaŭ niaj estraranoj helpas pri diversaj taskoj, sed la plejparto ankoraŭ restas ‘sur mia telero’. Tial pasintjare la estraro voĉdonis permesi min labori proksimume 30 horojn semajne anstataŭ nur 20, kiom tute ne sufiĉis (kvankam mi estas ankoraŭ pli-malpli konsiderata ‘part-tempa’ laboranto). Fakte dum la pasinta jaro, mia taskaro kreskis pli kaj pli. Ofte mi devas strebi ne superi la horlimon; estus *tre* facile labori tro, do mi konstante klopodas trovi bonan ekvilibron inter la laboro kaj mia familia kaj persona vivo. Fojfoje la laboro estas streĉa, sed plej ofte mi ĝuas ĝin.

Ekzemploj de specifaj taskoj

Komence de mia deĵoro pasintjule, mi devis fari plurajn administrajn taskojn rilate al la laŭleĝa translokigo de nia organizo de Majno al Kalifornio:

- plenumi formularojn de diversaj instancoj por starigi nian neprofitcelan statuson en Kalifornio;
- sendi kopiojn de niaj oficialaj dokumentoj de 1953, kiam fondiĝis nia organizo, kiuj pruvas nian neprofitcelan statuson al la IRS por ebligi ŝanĝon de adreso kaj ĉefkontaktulo en ĝia sistemo;
- akiri komercpermesilon kaj pagi kotizojn por akiri laŭleĝan rajton vendi varojn en Kalifornio;
- ŝanĝi kontaktinformojn (kaj pruvi oficiale mian identecon kiel la nova ĝenerala direktoro) en pli ol 50 kontoj, kiujn nia organizo uzas (*Paypal, Wordpress, ADP, Bank of America, Morgan Stanley, Simply Voting, Wells Fargo, WISE, USPS, Endicia, Amazon, Benevity, Dreamhost, Zoom, UEA*, nia 800-telefonnumero, ktp ktp) — grandega kaj temporaba projekto!
- Pro tio ke nur Vilĉjo povis administri nian malnovan retbutikon, kaj ĉar niaj membroj, laŭ nia enketo en 2023, volis pli modernaspektan retbutikon, mi kreis komplete novan retbutikon per *Square*; tiu tasko daŭris plurajn monatojn. Eĉ ankoraŭ restas pliaj libroj por foti, priskribi kaj aldoni al la rebutiko kiam aliaj pli urĝaj taskoj ne premas; espereble ĉi-somere ni kompletigos tiun projekton.

Krome mi konstante faras taskojn rilate al niaj membroj:

- Post la dissendo de niaj bultenoj, ĉiam revenas al la CO iuj ekzempleroj, kies adresoj malvalidis; mi kontaktas tiujn membrojn, ĝisdatigas la adresojn, afrankas kaj enpoŝtigas tiujn numerojn.
- Alvenas retbutikaj mendoj, kiujn mi traktas ene de kelkaj tagoj, kutime samtage.

- Novaj interesatoj telefonas aŭ retpoŝtas petante informojn, kies petojn mi peras al niaj volontuloj.
- Membroj kontaktas la CO-n petante helpojn pri diversaj aferoj: aliĝi al la Universala Esperanto Asocio, trovi kiel mendi maloftajn revuojn kaj certajn librojn, ktp.
- Komence de ĉiu jaro, necesas kalkuli niajn membrojn, kiuj membras ankaŭ en UEA pasintjare, kaj pagi malgrandan sumon al UEA por ĉiu ne-UEA membro.
- Mi kreis novan komitaton por helpi niajn membrojn, kiuj loĝas en malliberejoj, kiuj povas komuniki nur poŝte kaj bezonas korespondantojn, helpojn akiri librojn kaj gazetojn, ktp.
- Lastatempe, mi klopodas restarigi kontakton kun ĉiuj niaj Tutvivaj Membroj, ke mi povu sendi atestilon kaj dankleteron al ili — la Membreca Komitato multe helpas pri tiu projekto.
- Mi kreas proksimume du-foje monate retpoŝtajn anoncojn per *Mailchimp* al niaj membroj pri diversaj eventoj kaj informoj pri nia organizo kaj pri Esperantujo ĝenerale.

Aliaj taskoj rilatas al klopodoj ŝpari monon aŭ mian labortempon (kaj sekve niajn laborelspezojn):

- Kiam nia ‘direktora kaj oficista’ asekuro bezonis renovigon por la venonta jaro, oni taskigis min trovi novan (malpli multekostan) por nia organizo, kaj mi sukcesis!
- Mi aranĝis aŭtomatajn pagojn de niaj kontoj, inkluzive de la lupago por nia novjorka UN-oficejo
- Oni petis al mi kontroli niajn servabonojn ĉe *Dreamhost*, kiu provizas la servilojn por niaj retpaĝoj, kaj mi trovis kelkajn abonojn, kiuj ŝajnis ne plu necesaj, kiujn oni fakte intencis nuligi antaŭlonge; mi tion finfine faris.
- Mi strebas kvaronjare certigi, ke nia adreslisto por la bulteno estas ĝusta por ŝpari poŝtkostojn resendi ilin al nebonaj adresoj.
- Mi kontrolas detale la fakturojn de nia bultenpresisto, *Nero Ink*, por certigi, ke ni ne pagas erarajn sumojn.
- Mi proponis meti nian paperan balotilon en *Usona Esperantisto*, anstataŭ mane presi, afranki kaj sendi ĉiujn paperajn balotilojn al niaj sen-retadresaj membroj; tio ŝparis kaj poŝtkostojn, kaj laborkostojn.
- Ĉar mi regule printas afranketikedojn, kiuj uzas multe da inko, mi mendas reciklitajn altkapacitajn inkkartoĉojn, je rabatita pluropa kosto. Tiel mi ŝparas iomete da mono al la organizo kaj samtempe reduktas nian ekologian efikon.
- Kiam mia printilo paneis, anstataŭ aĉeti novan per Esperanto-USA, mi riparigis ĝin kontraŭ malmulta prezo.

Kompreneble, mi helpas ankaŭ organizi kaj administri nian ĉi-jaran Dulandan Kongreson (DLK):

- Mi aktive partoprenas kaj helpas gvidi ĉiun kunvenon de la Loka Kongresa Komitato (LKK) en Toronto, helpas prepari tagordon, kontrolas la protokolojn poste, kaj faras posttaskojn rilate al la kunvenoj.
- Mi kreas retpoŝtajn anoncojn al niaj kongresanoj kun detalaj informoj pri loĝado, manĝado ktp.
- Mi kunlaboras regule kun Chuck MAYS de *Esperantic Studies Foundation* je kunordigaj taskoj pri aliĝado, loĝado kaj manĝado por la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kaj la Dulanda Kongreso.
- Mi partoprenas oftajn retpoŝtajn diskutojn de la LKK pri decidoj, problemoj kaj ideoj.
- Kiam niaj membroj kontaktas min, mi kuraĝigas ilin konsideri partopreni NASK+DLK.
- Mi administras la DLK-partoprenon de niaj estraranoj kaj niaj Honoraj Gastoj, kies kotizoj estas finance subtenataj de Esperanto-USA.
- Mi taskigas niajn kongresajn stipendiatojn, kiuj devas volontule helpi la kongresorganizantojn.
- La programon, kongresan libron, feston, ekskursojn kaj aliajn kongresajn elementojn mi subtenas, prikomentas kaj prikonsilas al la respondeculoj.
- Mi kontrolas la financon bonstato de la kongreso kaj administras repagon al la Kanada Esperanto Asocio por la kostoj de la kongresejo/loĝejo, festohalo/festenmanĝo, ktp.

Mi ĉiam klopodas labori kiel eble plej efike kaj tempoŝpare, kaj provas konsideri fojfoje, kiujn taskojn mi povus transdoni al volontuloj. Sed la plejparto de la taskoj, kiujn mi faras, estas malfacile transdoneblaj al aliaj homoj. Tamen, kiam mi povas, mi faras.

Vere, el ĉiuj ĉi taskoj, tiuj, kiujn mi plej ĝuas, estas la membraj taskoj. Mi tre ŝatas komuniki rekte kun niaj membroj, speciale per telefono. Fojfoje mi ricevas telefonvokon de unu el niaj maljunaj, izolitaj membroj, kiuj ne uzas la Interreton, kaj tre ĝuas aŭdi iliajn rakontojn pri iliaj spertoj dum jardekoj da aktivado en la movado en Usono.

Krom la supre menciitaj devoj, unu el miaj plej gravaj respondecoj estas labori en maniero travidebla al la estraro de Esperanto-USA, ke ili plene komprenu mian agadon, kaj povu konsili min, kunlabori kun mi, kaj direkti min. Laŭ nia statuto, la estraro havas plenan respondecon pri nia organizo, kaj devas superrigardi min (pagatan laboranton). Ili dungis min, taskigas min, kaj kontrolas mian laboron por ĝusta kaj taŭga agado. Mi zorgeme certigas, ke mi regule raportas pri miaj taskoj, ne nur dum la monataj estrarkunsidoj, sed regule inter tiuj per diversaj komunikiloj. Mi sciigas la estraron pri taskoj, kiujn mi jam

fintraktis, kaj tiuj, kiuj ankoraŭ traktendas. Mi ĝisdatigas ilin pri progreso je longdaŭraj projektoj. Mi raportas pri defioj, kiujn mi alfrontas, kaj petas iliajn helpon, konsilon kaj ideojn. Kune, ni ĉiuj strebas fari la asocion pli profesia, efika kaj moderna organizo.


Modernaj, profesiaj teĥnologiaj rimedoj

Teĥnologio multe helpas min montri mian laboron al la estraro, kaj kunlabori kun niaj diversaj volontuloj (inkluzive de nia estraro). Komence de mia trejniĝo, Brandono kaj Quintyn kunlaboris dufoje semajne kun mi, klopodante profesiigi la funkciojn de la CO per modernaj laboriloj. Ni kune trovis plurajn tre utilajn teĥnologiajn rimedojn, kiuj videbligas mian laboron al la tuta estraro, aldone al tiuj, kiuj jam ekzistis:

Slack, nia tujmesaĝa labormedio, jam ekzistis, sed Brandono en 2023 senpage akirigis al ni la profesion version por neprofitcelaj organizoj, kio ebligas, ke ni kontrolu la tutan historion ekde 2017. Tie mi mesaĝas ĉiutage pri plej diversaj taskoj kaj temoj, kun niaj aktivaj volontuloj (la estraro kaj komitatanoj).


- Mi plurfoje tage detale mesaĝadas kun diversaj estroj de la organizo, speciale la Ekzekutiva Komitato (prezidanto, vicprezidanto, kasisto kaj sekretario).
- Mi ofte ĝisdatigas la estraron, kaj petas tie iliajn opiniojn, ideojn kaj konsilojn.
- Mi subtenas niajn komitatojn (la Nomuman, Membrecan, Kongresan, Projektan, Diskonigan, ktp).
- Mi anoncas helpbezonojn kaj aliajn novaĵojn al ĉiuj volontuloj.

Monday, taskorganiza programo. Tie la estraro povas rigardi mian taskliston, la traktstaton de la diversaj taskoj (ĉu finita, ĉu atendanta respondon, ĉu nun traktata). Jen ekzempla ekranfoto:



Item	Status	Date	Priority
Create email #2 in Mailchimp to registrants of Dulanda Kongreso webinars about Infana Programo, etc.	Waiting for response		High
Troubleshoot migrating data to new discounted GBC account through TechSoup	Waiting on S.		High
Get trained on new Springy member portal website / work on setting up portal for our needs	Waiting on S.		High
Put form 990 on our website	To do		Medium
Prepare list of Librarian books we plan to sell at DLK	To do		Medium
Input remaining book inventory & CD inventory into our online bookstore on Square	To do	Jan 31, 2024	Medium

TrackingTime, labortempa registrilo. Tie eblas vidi, kiom da tempo mi laboris pri ĉiu individua tasko, laŭ pluraj taskokategorioj:




Tiuj estas nur kelkaj ekzemploj, sed estas pluraj aliaj teĥnologiaĵoj, kiuj faciligas mian laboron. Ekzemple, nia organizo havas profesion konton ĉe *Google Workspaces*, kiun ni ankaŭ akiris senpage en 2023 kiel neprofitcela organizo. Per tio, ni provizas al ĉiu estrarano kaj al multaj komitatanoj profesiajn *Google*-kontojn, kun retpoŝto kaj aliro al ĉiu ĝiaj aplikaĵoj: *Google Docs*, *Google Sheets*, *Google Slides*, ktp. Tio donas profesion aspekton al la ekstera mondo, kiam ili interŝanĝas mesaĝojn kun adresoj ĉe *esperanto-usa.org*, kaj tio kreas profesion kuntekston ankaŭ interne — la dosieroj, kiujn ni kreas kaj uzas, apartenas al la asocio, ne al ajna individuo.

Ankaŭ ni uzas *Canva* por krei artgrafikaĵojn (kiel ekzemple niajn atestilojn por Tutvivaj Membroj), *Adobe Creative Suite* por *Usona Esperantisto*, *Zeffy* por niaj aliĝiloj por la kongreso, por donacoj al la organizo, kaj por nia membriĝilo, inter aliaj programoj. Mi lernis tiom multe pri ĉiuj ĉi rimedoj, per tiu ĉi posteno! Estas vere mirinde, kiom multe mi ne sciis je la komenco, kompare al nun — mi sentas min nun plene komforta uzi plej multajn el tiuj rimedoj, kaj ankoraŭ plulernos pri aliaj (ekzemple, Quintyn instruos al mi pli amplekse pri la uzo de *Wordpress* kaj *Canva* kiam ni havos tempon).

Resume, la laboro de la Centra Oficejo iras bone, tre bone. Certe okazas malfacilaĵoj fojfoje, sed nia teamo solvas tiujn kune, kaj aferoj ĝenerale iras glate. Mi ĝuas la laboron, kaj fieras povi servi nian komunumon kaj helpi nian karan lingvon akiri pli da respekto kaj sukceso en Usono.

Ekscitaj estontaj projektoj

Mi antaŭĝojas pri niaj estontaj projektoj, el kiuj mi mencias la du plej ekscitajn. Ni lastatempe trovis bonegan programon, *Springly*, kiu servos kiel nia membro-retejo. Per ĝi membroj povos krei membrokonton kun ĉiuj informoj pri si: foto, loĝurbo, hobiaj, Esperanto-historio — kio ajn, kiun oni volas, ke aliaj membroj sciu! Kvankam ni ankoraŭ esploras kaj provas ebligi tion ĉi (ni ankoraŭ trejniĝas, kaj baldaŭ ekos nian realig-fazon pri *Springly*), ni esperas, ke eblus vidi ‘Membromapon’ montrante la loĝurbojn de aliaj membroj en Usono. Tiel, vi ĉiuj povos multe pli facile trovi proksimajn Esperanto-parolantojn, inviti ilin al lokaj kunvenoj, kaj eĉ mesaĝi aliajn membrojn (kiuj starigas konton), rekte en la membro-retejo. Mi opinias, ke tiu projekto ege plibonigos niajn servojn al niaj membroj de Esperanto-USA — atendu pli da informo tre baldaŭ!



La supra mapo estas nur ekzemplo — ni daŭre prilaboras la detalojn, inkluzive por certigi ĉies privatecon.

Krome, mi kaj iuj el niaj estraranoj trejniĝas pri subvencipetado de privataj fondusoj por niaj programoj. Ekzemple, ni esploras eblecojn starigi novajn interretajn kursojn en Usono, simile al la Londonaj Kursoj, sed kun pli da niveloj kaj kurselektaj je konvenaj horoj por niaj membroj. Ni serĉos subvenciojn ankaŭ por la Film-Festivalo, por eldonado kaj konservado, kaj por vojaĝigi homojn de aliaj landoj al niaj kongresoj kaj inverse.

Mi esperas ke vi ĝuis legi mian priskribon pri la laboro, kiun mi faras en la CO kaj en nia organizo. Amikajn salutojn kaj bondezirojn al ĉiuj niaj membroj tra Usono!

Mar-May Board Activity

de la estraro

To conserve space, the newsletter includes only the minutes summary. The full meeting minutes (including discussions) are available on E-USA's main website.

March 2025

Proposal: that an amendment to the bylaws be presented to the membership with the ballot, as described below. Proposal passes unanimously.

Motivation:

The proposed amendment has two aims. The first is to have a consistent age requirement for the Board officer roles. Currently the role of Secretary has the same age requirement as a Director at-large, while President, Vice-President, and Treasurer all have a different requirement. This amendment would have the same requirement for all four officer positions.

The second aim is to reduce the age requirement for the four officer positions from 30 to 25. There are valid reasons to have a somewhat higher bar for election to these positions. Age can certainly be one indicator, though not guarantee, that a person has a higher level of maturity and responsibility. However, there are other factors which should also be taken into account by the nominations committee. We believe that the current requirement of 30 years of age is overly restrictive, and could be too limiting of the possible candidates for these officers, to the detriment of the organization. A requirement of 25 seems to strike a reasonable balance of ensuring some additional life experience, while allowing more candidates to be considered. (For comparison, 25 is the same age requirement that is required to be elected to the US House of Representatives.)

(Although we are not proposing any other change at the time being, for the sake of simplicity, we believe it could be useful in the future to consider additional requirements which could ensure well-rounded candidates, or at least recommended criteria for the nominations committee to consider. These could include criteria such as minimum amounts of time as a member, minimum levels of KER-competency, or individual membership in UEA.)

Current Bylaws Language:

§401. Any member who will be at least 18 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for Director **or Secretary**.

§402. Any member who will be at least **30** years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for President, Vice President or Treasurer.

Proposed Bylaws Language:

§401. Any member who will be at least 18 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for Director. **[Remove 'or Secretary']**

§402. Any member who will be at least **25** years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for President, Vice President, **Secretary**, or Treasurer.

April 2025

No Board Votes.

May 2025

No Board Votes.

Krucvortenigmo: *Hans-Paulige*

enigmoj • Kartero WILLIAMS

Denove post kelknumera paŭzo, jen vortkrucenigmo danke al Kartero WILLIAMS! Inter la solvintoj ni lotumos rabaton je 10 \$ de la retbutiko. La redakcio akceptas solvojn ĝis **20 Aŭgusto** al la adreso bulteno@esperanto-usa.org. Vi rajtas plenumi la enigmon rete ĉe *Amuse Labs* <maillonge.net/UE-2025-2-enigmo>, tamen solvoj ankoraŭ devas esti senditaj rekte al la redakcio.

Horizontale

1. Kuba urb'
8. Ne nuna, kaj verŝajne ne estonta
12. Esti iel samaspekta
13. Honoru
15. Sistema korupt'
16. Hilda Helene Dresen
18. Infektema
19. Ŝajna prefikso pri flugado
20. Forlavindaĵo
22. Kiel gustas bedaŭro
23. Povul' kiel Musk, Bezos, Zuckerberg
25. Ungolako-forigil'
26. Kion vi semis, _____ vi rikoltos
27. Ne "ĝusta famo", sed "serioza lamento"
30. Ne reale
31. Silka ŝtof'
32. Mezurunu' de sorbado de radioaktiveco
34. Pika sent'
35. Mallibera
39. Konstruata per maldikaj tabuloj
42. Bub' kun makulita vizaĝo
44. Inter reĝo kaj du
45. Blankan, kiel sur nigra tabulo
46. Em' ŝpari
47. Altec'
49. Aranĝ' de aferoj
50. Mank' de kapablo
52. Eta gigant'
56. Plaĉa
57. _____ metis makulon en mian kalkulon
58. Bastonet', kiun tenas la dekstra mano de violonisto
61. Fluganta rekte al sia celo
62. Elstare, kiel brajlo
64. Brili
66. Orienta abat'
67. Kien oni intime rigardas
70. Pozici'
71. Temo de la poemo *En Ĉi Murdepoko*
72. Mallonga esprimo de letala amuziĝo
75. Ofensive
76. Simbolo de scienco pri la menso, greklitere
77. *Stela ĉiam nur kritikas, Teo kaj Libro*j, kaj *Scivolemo*
78. Ege malgranda part'


80. Esperantig' de antaŭnomo de TONKIN
82. Koraspekta emblemo
84. Komponent' de karapaco
86. Ne "bunta hindamanĝaĵo", sed "suferiga haŭt-duraĵo"
89. Fotelo
93. Amfibioj de zoologia ordo senvosta
95. "Se ne tiel", aŭ pli ĝuste: en malsama gramatika rolo
96. Gramatika rol' esprimata per *al*
97. Plendletero
100. Kiu hundon mian batas, mi mem ne _____ ŝatas
101. Enkarcerigo
102. Tia, kia videoludo
103. Propra parolmaniero
105. Nedifinita regulo, eble de Tonjo
106. Aŭtoro
107. Sin-tena ekzercado
108. Pordo indikata de lumigitaj literoj

Vertikale

1. Japana neĝbula arbust'
2. Kiel oni abonas *Usona Esperantisto*
3. Ne naskiĝu _____, naskiĝu feliĉa
4. Vojo inter arboj
5. Zorge verkita programo
6. Beb'
7. Tia, kia la poezio de Raymond Schwartz
8. Muelilo haltas, muel _____ eksaltas
9. Tre preciza, parolante pri horloĝoj
10. Malkaŝe pretigi atakon, eventuale ĉe ŝako
11. Afabla
12. Korana ĉapitro
13. Branĉ' de la Belartaj Konkursoj
14. Mallonga, parolante pri loĝado ĉe hotelo
15. Naŭa best' de la ĉina zodiako
16. Ekhavas, ekzemple ideon
17. Fakas
18. Kotonaj'
20. Kudri faldon
21. Trajto de frakcio
23. Fakasocio de UEA kiu nomas birdojn
24. Hinda muzo
27. Ne "plezura peco", sed "longa jardero"
28. Nekurb'
29. Jaguar' sur kapoto

31. Tia, kia la 1955 Universala Kongreso en Bolonjo, Italujo
 33. Ne "mallaŭta sonkoloro", sed "kompleta korpoparto"
 35. Plac' kiel *Times*
 36. Lok' kiu laŭ Kalle Kniivilä estas nia
 37. Simpla maŝin'
 38. Feblozo
 40. _____kaĉo
 41. Eta rostrul'
 43. Torĉo
 48. Kolora genro de fungoj
 51. Quo _____
 53. Terur'
 54. Pinglo
 55. Otto Jespersen kaj Hans Christian Andersen
 59. Vestiĝi nigre, bruligi kandelon, kaj diri latinaĵon
 60. Malatenti invito-mankon
 63. Antilop'
 65. Rigardi kaj _____ ne devigas akiri
 68. Eŭropa monunuo 8-Horizontala

69. Rekta kaj honesta
 72. Blekas kapre
 73. Partopreni IJK-on
 74. Direkti originen
 79. Tiaj, kiaj la kestoj en kuirejo
 81. Ludata parto
 83. Malkiel 4-Vertikale
 85. Grafo
 87. Kiel oni partoprenas Esperantujon
 88. Fring'
 89. Religia pureco
 90. Oficiala listo
 91. Saud-araba urbo kiu gastigis F1-ajn aŭtokonkursojn
 92. Ingredienco de omleto
 94. Longa ĉirkaŭir' de la suno
 96. Guvernistin' de fraŭlino
 98. Folio
 99. Mio
 101. Krom tio
 104. Fera farb'



2025 K1 Financa ĝisdatigo

de la kasisto • Matt Brooks

Dum ni progresas tra 2025, ni ĝoje prezentas nian finraporton por la unua kvaronjaro. Ĉi tiu ĝisdatigo reflektas nian daŭran engaĝigon en travidebleco kaj respondeca administrado de niaj rimedoj.

Ĉefaj financaj indikiloj

- **Saldo de la kuranta konto (31-an de Marto 2025):** 27 201 \$
- **Kredit-karta saldo (20-an de Marto 2025):** 46 \$
- **Enspezo de la libroservo (31-an de Marto 2025):** 1 758 \$ | 1 700 \$ neta (survoje por atingi nian buĝetitan celon)
- **Tuta investa saldo (31-an de Marto 2025):** 596 816 \$ (ne inkluzive de Reed Trust, ĉar ĝi estas aparta jura ento administrata de Esperanto-USA; por detaloj vidu sube)

Resumo de konto-movoj

Saldoj de la kuranta konto

Dato	Saldo
20-a de Januaro	1 882 \$
20-a de Februaro	866 \$
20-a de Marto	46 \$

Rimarko: La signifa redukto de la kredit-karta saldo dum la kvaronjaro reflektas bonegan kredit-administradon.

Resumo de la investaj kontoj

Konto	Komenca saldo	Fina saldo	Neta ŝanĝo
Fondusoj	277 708 \$	282 468 \$	+4 760 \$
Nelimigita	314 208 \$	314 348 \$	+140 \$
Reed Trust	405 741 \$	408 614 \$	+2 873 \$

- **Fondusa konto** iomete kreskis pro enspezoj de interezoj kaj dividendaj pagoj, spite al merkataj fluktuoj.

- **Konto de nelimigitaj investoj** restis stabila kun eta kresko, subtenata de intereza enspezo kaj konservema investa miksaĵo.
- **Konto Reed Trust** montris modestan kreskon danke al konstanta enspezo malgraŭ moderaj valor-ŝanĝoj en investoj.

Memorigo: La konto Reed Trust estas aparta jura ento administrata de Esperanto-USA. En 2025, la prognozitaj enspezoj (14 400 \$) subtenos la NASK-programon en Toronto.

Financaj diagramoj pri la investokontoj

- Investo-konsisto:
 - 53% - Nelimigita konto
 - 47% - Fondusa konto
- **Reed Trust** montras kresketon malgraŭ merkataj fluktuoj:
 - 405 741 \$ - malferma saldo
 - 408 614 \$ - ferma saldo

Elstaraj agoj de la kasisto-oficejo

- Matt kaj Amanda renkontiĝis kun *Morgan Stanley* (MS) por la revido de niaj kontoj en K1.
- Ni diskutis eblon engaĝi ilin pri aktiva administrado de niaj investoj.
 - Niaj fondusaj investoj estas konserveme aranĝitaj (ĉefe fiksenspezoj), kio pruviĝis utila dum merkataj ŝanĝoj.
 - La nelimigitaj investoj konsistas el pli da riska enhavo (ĉ. 70% en akcioj), tial ili estas pli sentemaj al merkataj ŝanĝoj.
 - *Reed Trust* havas dividon je proksimume 50/50 inter akcio kaj fiksenpezoj valorpapiroj, kio klarigas ĝian mezuman reagon al merkataj fluktuoj.
- *Morgan Stanley* sendis proponojn por eventuala konto-administrado, kun rilata kotizo. Pli probable ni tasku ilin nur pri la administrado de la investaj kontoj kaj nelimigitaj kaj *Reed Trust*, ĉar la fondusoj restos plejparte en stabilaj investaĵoj.
 - Rimarkinda fakto: MS-administrataj kontoj atingis pli ol 8% kreskon en K1, ĉefe pro strategia turniĝo al eksterlandaj investoj post la usonaj elektoj de 2024.

Rigardante antaŭen

Ni daŭre fokusas nian atenton:

- plenumi la transiron kaj purigadon de niaj datumoj en *QuickBooks Online*. Ni sukcesis redukti ĉi tiun koston je ~600 \$ jare, kvankam ni spertis teknikajn defiojn pri la migrado.

- analizi la proponon de *Morgan Stanley* pri aktiva konto-administrado.
- pretiĝi por la venonta DLK kaj la NASK-programo, subtenata de la konto *Reed Trust*.

Via subteno ebligas al ni konservi finanĉan sanon kaj efike plenumi nian mision. Por demandoj aŭ por pli da informo, bonvolu kontakti min ĉe: kasisto@esperanto-usa.org.

Esplorante la lingvon de financoj, parto 2

de la kasisto • Matt BROOKS

En nia unua afiŝo pri la lingvo de financoj, ni prezentis liston de 20 esencaj terminoj, kiuj helpas esperantistojn pli bone kompreni la finanĉan mondon. Ni daŭrigas tiun serion per praktika ekzemplo: mallonga dialogo inter la kasisto kaj prezidanto de Esperanto-USA dum planado de la nova buĝeto. Ĉi tiu konversacio servas kiel lernilo por uzi fakajn esprimojn en kunteksto.

Prezidanto: Dankon pro via laboro pri la buĝetpropono. Ĉu vi povus klarigi al mi la diferencon inter la **monfluo** kaj la **netaj aktivoj**?

Kasisto: Kompreneble! La **monfluo** montras, kiom da mono eniras kaj eliras dum specifa periodo — ĝi helpas nin kompreni, ĉu ni povas pagi niajn ĉiutagajn elspezojn. La **netaj aktivoj**, aliflanke, estas la tuta valoro de niaj aktivoj minus niaj ŝuldoj — do tio montras nian longtempan finanĉan sanon.

Prezidanto: Kaj ĉi tiu linio pri **rento** — ĉu temas pri lupagoj?

Kasisto: Ne. En la finanĉa kunteksto, **rento** signifas regulan enspezon ricevatan el investoj, kiel pruntedonita mono aŭ valorpaperoj. Ĝi ne estas lupago, sed pasiva enspezo, ofte el fondusoj aŭ finanĉa aranĝo kiam kapitalo generas periodajn profitojn.

Prezidanto: Krome mi rimarkis, ke ni planas uzi parton de la **rezervo**. Ĉu tio ne estas risko?

Kasisto: Ĝi estas kalkulita decido. Ni uzos limigitan parton de la rezervo por subteni novan **programon**, sed ĝi estas komplementita de **subvencio**, kiun ni petis — se ĝi estos aprobita, ni povus remeti la elspezon en la rezervon.

Prezidanto: Kaj la **buĝetita profito** por la jaro — ĉu ĝi inkluzivas la enspezojn el donackampanjoj?

Kasisto: Jes. Ni bazis ĝin laŭ la mezumo de antaŭaj jaroj, sed ĉi-jare ni ankaŭ planas pli aktivan **monkolektan kampanjon**, kun aparta emfazo dum Donac-Mardo. Tio povus helpi nin atingi la **buĝetajn celojn** sen tuŝi tro multe la rezervojn.

Prezidanto: Bone. Mi pensas, ke ni devus klarigi en la raporto la celon de la **fondusoj** — kelkaj membroj demandis, kial ni ne simple uzas tiun monon.

Kasisto: Certe. Fondusoj ofte havas limojn: ekzemple, kelkaj celas subteni edukajn programojn, aliaj subtenas apartajn subvenciojn por kreskigi la komunumon. Tial ili ne estas tuj uzeblaj por ĝeneralaj operacioj. La enspezoj el tiuj fondusoj — la **rento** — povas esti uzataj nur laŭ la instrukcioj de la fonduso.

Ĉi tiu dialogo ilustras, kiel fakvortoj kiel **monfluo**, **netaj aktivoj**, **rento**, **rezervo**, **subvencio**, **buĝetaj celoj**, kaj **fondusoj** aperas en realaj finanĉaj diskutoj. Per pli da tia praktika uzado, ni esperas helpi al ĉiuj legantoj kreskigi sian komforton kun finanĉa faklingvo.

Ĉu vi havas finanĉan aŭ administran vorton, kiun vi volas aldoni al la listo? Aŭ eble ekzistas termino, kiun vi trovas neklara aŭ miskomprenata? Sciigu al ni viajn ideojn per mesaĝo al kasisto@esperanto-usa.org, kaj ni eble traktos ĝin en estonta afiŝo.

Restu kun ni — la serio daŭros kun pliaj ekzemploj, klarigoj, kaj realaj situacioj el la agado de Esperanto-USA!

Kial Burno?

facila teksto • Ruth "Margo" KEVESS-COHEN

La UK (Universala Kongreso) okazos ĉi-jare en la urbo Brno, Ĉeĥujo. *Brno* estas la nomo de tiu urbo en la ĉeĥa lingvo, sed ĝis lastatempe ĝi ne havis ĝenerale akceptitan Esperantan nomon. Ĉu la ĉeĥa nomo povus funkcii en Esperanto sen ŝanĝi la literumon? Tio estis la demando, kiun renkontis la organizantoj de la UK pasintjare. Membroj de la LKK (Loka Kongresa Komitato) en Ĉeĥujo kontaktis UEA, kiu diskutis tiun demandon kun la Akademio de Esperanto. Ni esploru la demandon, kaj kiel niaj kleruloj respondis al ĝi.

Kial *Brno* prezentas problemojn? Estas pluraj kialoj. Unue, en Esperanto ĉiu silabo devas enhavi vokalon, sed en la unua silabo de *Brno* mankas vokalo. Tial *Brno* neniel povas esti plene esperantigita nomo. (En la ĉeĥa lingvo la litero *r* povas funkcii kiel vokalo, do *Brno* tamen estas facile elparolebla por ĉeĥoj.)

Due, kvankam estas akcepteble uzi fremdlingvajn loknomojn en Esperanto kiam esperanta formo ne ekzistas, necesas zorge atenti la uzon. La urbo *Brno* estas akceptebla en Esperanto kiel fremdlingva formo, sed kiel oni nomu la loĝantojn? La formo *Brno-anoj* estas akceptebla, ĉar oni rekonas, ke *Brno* estas fremdlingva nomo. Sed oni ne rajtas diri **brnanoj*, aldonante esperantan finaĵon al fremdlingva radiko. Kaj kiel oni formu la adjektivon en Esperanto? **Brna* ne estas akceptebla vorto en Esperanto. Do estas plej konvene, ke ekzistu esperanta nomo.

Trie, la UK-urbo tradicie havas esperantan nomon; kiam mankas tia nomo, UEA decidas pri ĝi. Ekzemple en 2015 la UK okazis en *Lillo* (Lille, Francio) kaj en 2019 en *Lahtio* (Lahti, Finnlando).

Kiun esperantan nomon elekti por Brno? Ĝia nomo en diversaj naciaj lingvoj estas sama kiel la originala *Brno*, sed ekzistas aliaj formoj en pluraj lingvoj. Tial ne estis evidente al la kleruloj en UEA kaj en la Akademio, kion fari. Ekzemple, en la germana ĝi estas *Brünn*, en la latina *Bruna*, en la jida *Brin*, en la albana *Bërno*. La akademianoj konsideris formojn kun aliaj vokaloj, ekz. *Barno*, *Berno*, *Birno*, *Borno* kaj *Burno*. *Berno* jam estas esperanta nomo

de la svisa urbo Bern, do ne taŭgas por Brno. Oni konsideris *Bruno*, sed ĝi estas ofta vira nomo, kaj bruno estas koloro. *Burno* ne havas tiajn malavantaĝojn, kaj ĝia elparolo sufiĉe similas al la nacilingva elparolo de *Brno*. Tial finfine la rekomendo de la Akademio estis *Burno*. La ĉefa problemo pri la nova esperanta nomo de Brno estas, ke *Burno* ne estas tuj rekonebla. Tial en kongresaj informiloj foje aperas la du nomoj kune: “Burno (Brno)”. Kompreneble kiam oni aĉetas bus-, trajn- aŭ flug-bileton al la kongresurbo ĉi-jare, oni uzu la nacilingvan formon *Brno*!

Bonan vojaĝon al Burno (Brno)!

Ĉi tiu artikolo, unue aperinta la 2-an de Majo, estas republikigita kun permeso el *uea.facila*. Ĝi aperas en *UE* kun nur etaj ŝanĝoj tipografiaj kaj stilaj. Jen la listo de novaj vortoj:

- **adjektivo**: vorto finiĝanta per -a en Esperanto, kiu montras econ aŭ kvaliton, ekzemple “granda”, “bona”.
- **akademio**: asocio de verkistoj, artistoj, sciencistoj aŭ simile, kiuj renkontiĝas por interŝanĝi ideojn.
- **al-doni**: doni aŭ diri ion plian, krom tio, kion oni jam donis aŭ diris.
- **ekz.**: ekzemple
- **evidente**: klare, tiel ke oni facile vidas aŭ komprenas ĝin.
- **klerulo**: homo kun multaj scioj pro vasta legado kaj bona kompreno pri kulturaj aferoj.
- **komitato**: grupo de personoj elektitaj por fari organizajn taskojn; gvidantaro de asocio.
- **literumo**: la preciza sinsekvo de literoj en iu vorto.
- **malavantaĝo**: tio, kio alportas pli malbonan situacion, malgajnon aŭ malutilon.
- **rekoni**: koni iun aŭ ion, ĉar oni jam renkontis lin/ŝin/ĝin pli frue; anonci la pravecon de iu fakto; akcepti ion kiel validan aŭ valoran; **rekonebla**: homo aŭ afero, pri kiu eblas scii kiu aŭ kio ĝi estas, ĉar oni jam renkontis ĝin pli frue.
- **silabo**: parto de vorto, ekzemple la vorto “saluton” havas tri silabojn: sa-lu-ton.
- **UEA**: Universala Esperanto-Asocio
- **vokalo**: la vokaloj de Esperanto estas A, E, I, O, U.

Raporto de Printempa Esperanto-Renkontiĝo 2025

kongresaj raportoj • Christopher JOHNSON



Kiel oni kreas bonan esperantan etoson? Ĉu per interesa instruado? Ĉu per amuzaj ludoj? Ĉu per bela loko? Unu semajnon en Marto, dek kvin esperantistoj vojaĝis al *Valle Crucis* (Valo de la Kruco), Nord-Karolino pro la Printempa Esperantista Renkontiĝo (PER). Tie, ili klopodis krei propran kaj agrablan esperantujon.

Ĉi-jare, PER okazis dum tri tagoj — de vendredo, la 14-a de Marto al dimanĉo, la 16-a. Kiel antaŭe, ĝi okazis ĉe la *Valle Crucis Episcopal Mission* (Episkopa Misio) en la montaro de okcidenta Nord-Karolino. La loko estis kaj bela kaj izola, kun akvofalo kaj ermitejo. Kvankam la vetero ne ĉiam belis, la vigleco de la esperantistoj ĉiam restis.

La partoprenantoj alvenis ĉirkaŭ la kvara posttagmeze en vendredo. Antaŭ la enkonduko de la programaro, la esperantistoj iris al la manĝejo por vespermanĝi. Ĉiu manĝo okazis tie kun aliaj grupoj de ne-esperantistoj, kiuj same kunvenis ĉe la misio.

Post la manĝado, Bill MAXEY, la gvidanto de la semajnfino, enkondukis la programaron. Li elektis la temon “Kontribuoj de ĉefaj esperantistoj” pro la ĉi-jara loko de la Universala Kongreso en Ĉeĥujo. Sur la muroj de la kunvenejo, Bill jam algluis fotojn de famaj ĉeĥoj.

Bill ankaŭ iomete parolis pri Renato CORSETTI pro lia freŝdata morto. La grupo legis poemon de Renato kaj lernis lian vidpunkton pri bonlingvismo. Preskaŭ ĉiuj lernis novan informon pri sinjoro Corsetti.

Sabate, ĉiuj vekiĝis viglaj kaj iris al la manĝejo antaŭ la rekomenco de la programaro. Pro la deziro de Bill Maxey, ke Esperantujo havu pli bonajn prezentaĵojn, multaj homoj preparis prelegojn pri diversaj temoj. Prelegantoj prezentis informojn pri droneoj, vokaloj kaj prononco, tabloludoj, japanaj segiloj, la etimologio de esperantaj vortoj, kaj eĉ pri urbo kromnomite azeno-urbo!

La grupo ankaŭ lernis pri esperantaj verkistoj el Ĉeĥujo. Ili legis poemojn de Eli URBANOVÁ, Henri BAUPIERRE, Stanislav SCHULHOF, Jiří KOŘÍNEK, Tomáš PUMPR, kaj Karolo PIČ. Legitaj

estis ankaŭ elĉerpitaĵoj el romanoj de Eli Urbanová kaj Karolo Pič.

Pasintjare, sabaton posttagmeze, multaj el la esperantistoj marŝadis al la akvofalo, sed ĉi-jare la pluvo malebligis tion. Antstataŭe, ili ludis ludojn en la kunvenejo. Fakte, oni ofte povis trovi ludantajn esperantistojn tie. La du plej ŝatataj ludoj estis ambaŭ vortludoj: La unua estis ludo, en kiu ludantoj kune verku rakonton per la elekto de figura ĵetkubo. La dua estis ludo, en kiu ludantoj klopodas elekti la saman vorton sen komunikado. Se la du vortoj estus malsamaj, ili ambaŭ elektus novajn vortojn, kiuj iel kombinas la antaŭe elektitajn vortojn.

Post la lernado, sabatnokte, la grupo festis distran vesperon. Iuj alportis muzikilojn kaj la grupo kune kantis diversajn kantojn, inkluzive de “La Lasta Kanto” de Kajto. Iuj aktorin kaj rakontis ŝercajn rakontojn. La sperto ĝojigis ĉiujn.

Bedaŭrinde, la vetero ŝanĝiĝis sabatnokte. Venis fulmotondro. La esperantistoj dormis maltrankvile dum la ventego faligis multajn arbojn kaj branĉojn. Pro la malnoveco de la dormejoj, iuj povis aŭdi la venton tra la dormĉambraj fenestroj. Dimanĉon matene, la grupo vekiĝis kaj devis translokigi arbon, kiu falis trans la vojon al la manĝejo.


Dimanĉo estis la tago, kiam ĉiuj parolis pri la lingvo mem. Specife, la grupo legis la Manifeston de Raŭmo kaj la Manifeston de Prago. Poste, ili diskutis pri ambaŭ manifestoj kaj ĉu ili samopiniis. Antaŭ tagmanĝo okazis diskuto pri la estonteco de PER kaj pri tio, kiujn elementojn homoj ŝatis aŭ ne ŝatis. Tagmanĝo estis la lasta fojo, kiam ĉiuj kuniĝis, ĉar poste la esperantistoj pakis siajn valizojn kaj foriris.

Laŭ la partoprenintoj, PER sukcesis krei etoson priskribitan kiel “NASK-eto” (eta Nord-Amerika Somera Kursaro). Tio estis ne nur komplimento pri PER sed ankaŭ pri la reputacio kaj graveco de NASK en la mensoj de usonaj esperantistoj. PER okazos venontjare en Norda Karolino, kaj la partoprenintoj volas inviti vin ĉiujn.

La idioto

Esperanto en populara kulturo

media hits • Brandon SOWERS



Dum kelkaj jaroj, mi faris noton, ĉiam kiam mi rimarkis mencion de Esperanto en nuntempa amaskulturaĵo, ekzemple en filmoj kaj romanoj.

Por mi unu el la plej interesaj estas la parte aŭtobiografia romano de Elif BATUMAN, *The Idiot* (La Idioto), de 2017 — la nomo estas intenca omaĝo al Fjodor DOSTOJEVSKIĤ, samkiel ŝia unua romano, *The Possessed* (“Diabloj” en Esperanto, laŭ la rusa). La romano estis finalistino por la premio Pulitzer en 2018, kaj meritas legon.

La intrigo sekvas studenton ĉe *Harvard* en la fruaj naŭdekaj jaroj, kiu pro diversaj kialoj elektas pasigi someron en Hungarujo. Tie ŝi renkontas diversajn esperantistojn.

Kiam mi legis tion, mi absolute kredis, ke tio baziĝas je la propra sperto de la aŭtoro. Ja temas pri lando, kiu havis sufiĉe disvastiĝintan Esperanto-movadon kaj kulturon dum la socialisma periodo, el kiu restas spuroj eĉ hodiaŭ, des pli en la naŭdekaj jaroj. (Kiam mi partoprenis la Internacian Junularan Festivalon en 2011, tio okazis ĉe junulara tendaro, kiu daŭre havis statuojn de heroaj laboristoj.)

Supozante, ke temis pri veraj spertoj, mi des pli scivolas: Ĉu iu el niaj hungaraj samideanoj memoras renkonti usonan studentinon en la fruaj naŭdekaj jaroj? Eble vi aperis en preskaŭ-Pulitzer-ita romano!

Esperanto aperas en tri malsamaj partoj de la romano. Mi citas sube - notu, ke eĉ aperas vortoj rekte en Esperanto.

Citaĵoj el la libro

Rózsa came to the door with her aunt Piri. We were staying at Piri’s house, which was bigger than Rózsa’s parents’. Rózsa and Piri were small-boned, with fair skin and black hair, but Rózsa was taller and thinner. Piri wore a yellow sweat suit; Rózsa, a turquoise plaid shirt and turquoise sweatpants. Rózsa was silent and severe. Piri, a piano tuner who spoke fluent Esperanto, stroked my hair and uttered mysterious exhortations. “*Saluton!*” she said. “*Bonvenon!*”

(*Pli poste...*)

After dinner, Emese changed into a miniskirt and went out. Rózsa and Piri and I put on our nightclothes and sat in the living room, talking about Esperanto.

Esperanto had words from every language in the world. However, the only Hungarian words were *papriko* and *gulaŝo*. Reaching for her phrasebook, Piri knocked over a silver mirror and it broke into three pieces. She and Rózsa dissolved into helpless laughter and Piri went to get the glue.

She returned with a phrasebook, published in the eighties, which translated between Russian, Esperanto, Hungarian, German, and English. “We would like to know more about the rest cures (sanatoriums) of your country,” I read. “We would like to talk to the workers. I am a Communist (Socialist, Democrat, Liberal).” “I am an atheist (Catholic, Protestant, Jew, Muslim).” “I would like to see this lathe more closely.”

The list of frequently used nouns included: struggle for peace, woman, love, constitution, deputy, congress, delegation, friend, mother, little girl, salmon, sturgeon, red (black) caviar, champagne, vodka, watermelon, cherry, sour cherry, horseradish, and beefsteak. “*Fini!*”, exclaimed Piri happily. She was done gluing the mirror.

(*Pli poste...*)

The bus to Szentendre left early in the morning. Piri gave me a pill at breakfast that she said would prevent me from getting sick. When I said I would prefer to wait until I was actually sick to take any pills, both Rózsa and Piri started talking heatedly at the same time. “*Malsano!*” Piri shouted in Esperanto, mimed vomiting. “*Malsano, blechhh!*” Eventually I put the pill under my tongue and pretended to swallow.

Pli forta komunumo kun esperantista identeco kiel celo

eseo • Bill MAXEY

Lastatempe mi legis en *Literatura Foiro* tre pensigan artikolon—fakte tekston de prelego—de Alessio GIORDANO pri la graveco de komunumo en la Esperanto-mondo, kaj kiel tiu “mikrosocio” diferencas de la movado.¹ Giordano atentigas, ke movadoj ekestas en specifa epoko kun specifa celo kaj ĉiam rigardas eksteren, al la makrokosmo. Tamen, kiam kondiĉoj tie ŝanĝiĝas kaj la celo fariĝas malpli klara, movadoj devas redifini sin por daŭre efiki. Laŭ li, la esperanta nuntempe renkontas obstaklojn interalie pro tio, ke malfacilas taŭge analizi la situacion por trovi la irendan vojon.

Kontraste, komunumoj estas internaj aferoj, kiuj ade evoluas kaj, fakte, necesas por garantii la estontan vivon de siaj principoj kaj kulturaj valoroj. Ni konsideru ĉi tie do kelkajn ideojn rilate la mondon de Esperanto kaj pli specife ties komunumon en Usono.

Ni bone scias, ke malgraŭ tio ke ĝi apenaŭ utilas en la ekstera mondo, Esperanto tamen havas ĉiam pligrandigantan aron da uzantoj en ĉiam plivastiĝanta teritorio. Kial? Certe la pli efikaj hodiaŭaj kampanjoj de informado kaj merkato allogas pli da lernantoj, sed la trajtoj de la komunumo kaj ties kulturo kredeble rolas eĉ pli signife en la postaj decidoj de lernantoj.

Priparolante la transformadon de lernanto al “aŭtenta” membro de la komunumo, Giordano proponas identecon kiel utilan koncepton. Li asertas, ke “post la komenca entuziasmo, tiuj, kiuj restas esperantlingvaj, estas homoj trovintaj en esperanto, konscie aŭ ne, formon de identeco”.² Plue, “efektiva esperanta identeco estas la rezulto de jaroj da partopreno en la lingvo kaj serioza studado de la esperanta kulturo, kaj al tiu konsciiĝo oni alvenas, se entute oni alvenas, nur poste”.³

Tiu ĉi ideo pri identeco, laŭ mia sperto, ŝajnas kaj aŭtenta kaj utila. La multlingvanoj, kaj aliaj, kiuj interesiĝas nur pri la lingvo, ne sentos identecon. Nek tiuj, kiuj aliĝas precipe por trovi simpatiajn homojn, kun kiuj ludi aŭ alimaniere amuziĝi. Aliflanke tiuj, kiuj enradikiĝas en Esperanto-grundo, ja “malkovras” sian identecon kaj fariĝas la kerno de la komunumo. Ili plej kontribuas al la kulturo kaj tiel garantias la vivadon kaj estontecon ankaŭ de la lingvo.

Dinamika komunumo sendube allogas pli da homoj ol iu, kiu stagnas. Tio signifas, ke fortikigo de nia usona societo devus resti konstanta prioritato por ni ĉiuj. Kiel organizaĵo E-USA devas certigi, ke la movada flanko ne superu tiun de la komunuma. Kiel individuoj, ĉiuj el ni devus trovi

manierojn klerigi nin rilate la idearon, la historion kaj la literaturon, sur kiuj la aktuala kulturo baziĝas. (Ĝiaj tradiciaj principoj kaj valoroj validas hodiaŭ ne malpli ol en aliaj epokoj.)

Atingi efikajn rezultojn tamen estas hodiaŭ pli malfacile ol en antaŭaj epokoj pro unu granda ŝanĝiĝo en la usona Esperanto-pejzaĝo.

En pli ol tri jardekoj la plej fekunda kaj nutripova centro de esperanta kulturo en Usono troviĝis ĉe Sanfranciska Ŝtata Universitato, dum la tri-semajnaj NASK-sesioj. Pro tio, ke temis pri altlernejaj kursoj por universitata kredito, ilia enhavo estis substanca kaj la hejmtaskoj sufiĉe postulemaj. Ekster la klasĉambroj, la studentoj, ĉiam de pluraj kontinentoj, trempiĝis kunlabore kaj amikeme en tut-esperanta etoso kun tre variaj programeroj, interalie prelegoj kaj rakontoj, ekpozicioj, demonstraĵoj, distraj vesperoj, ludoj, UEA/ILEI-ekzamenoj, ekskursoj, festoj kaj ampleksa libroservo. La konoj kaj scioj de homoj kun tre malsamaj spertoj kunfandiĝis kaj disvastiĝis en neformalaj renkontiĝoj kaj instigis interparoladon kaj diskutadon. Tie oni trovis modelajn esperantistojn de tre diversaj specoj. Tia medio fervorigis la studentojn kaj kondukis ilin poste al plia profundigo en esperantajn literaturon kaj kulturaĵojn, plifortigante ĝuste ilian identecon kiel esencajn partojn de la esperanta komunumo.

Poste, la spertoj de homoj dum NASK efikis ankaŭ sur la membrojn de iliaj lokaj grupoj kaj tiel akvumis la tutan Esperanto-pejzaĝon en Usono, aparte la disajn oazojn de aktivaj kluboj. Al la nuntempaj NASK-oj, multe pli mallongaj kaj malpli diversaj, kompreneble mankas simila povo. Necesas do konsideri aliajn manierojn kompensi kiel eble tiun frapan diferencon. Kiel klerigi homojn, jes, sed pli grave, kiel stimuli ilian scivolemon, tiel ke ili mem startigu aŭ diligente antaŭenigu sian propran esploradon?

Jen kelkaj ideoj por individuoj:

Diligente daŭrigu vian lingvolernadon (aparte plibonigante la legokapablon por legi pli multe), aliĝu al fakasocioj, abonu revuojn, aktivu en grupoj, partoprenu renkontiĝojn.

Legu ofte kaj multe—por informiĝi pri aktualaj, esplori nuntempajn kaj klasikajn verkojn kaj distriĝi.

Serĉu taŭgajn rimedojn en la interreto aŭ aliloke por pligrandigi viajn konojn pri ĉio esperanta. (Efektive la artikolo en Vikipedio pri “Historio de Esperanto” prezentas bonan superrigardon kun tre multaj ligiloj al aliaj fontoj.)

Organizu lokan klubon se troviĝas en via proksimeco kelkaj esperantistoj. Se jam ekzistas klubo—vi bonŝancas!—apogu ĝin kaj zorgu, ke la programoj riĉu kulture. Eventualaj ŝanĝoj en la aktivajoj aŭ ritmo povus fari ĝin pli efika.

La precipa celo, mallonge: Faru vian esperantistecon esenca parto de via vivo—kaj do de via identeco.

Giordano asertas ankaŭ, ke “Vivi pli intense kaj aŭtente esperanton iagrade transformas nian personecon, kvazaŭ oni vivus en du mondoj: la granda makrosocio, kaj nia mikrosocio. En tiu ĉi situacio, ĉiu esperantisto, kun sia unika identeco, partoprenante la lingvon kontribuas al la plua ekzistado de nia komunumo”.⁴

Indas substreki unufoje pli la signifon de tiu komunumo. Hector HODLER, jam en 1908, aludante la tiutempan esperantistaron, rimarkigis: “...lingvo ne povas vivi sen sia popolo. Tiu malgranda popolo ĉiutage kreskos, kaj ju pli ni multigos kaj plirealigos la ligilojn, kiuj ekzistas inter ĝiaj membroj, des pli ĝi fortiĝos kaj potenciĝos”. Ankaŭ ni, post jarcento, sentu tiun fortikon kaj potencon!

E-USA devus okupiĝi pri la plifortigo de la kreskanta esperanta popolo en Usono, konstante nutrante la membrojn per stimulaĵoj kaj utilaj artikoloj en la bulteno, pensigaj prezentaĵoj en la kongresoj kaj diverseco en la libroservo. Ĝi daŭre flegu la lokajn kaj regionajn grupojn kaj provu starigi pli da regionaj renkontiĝoj, kun kulture riĉajn programojn. Spertuloj helpu al novuloj, dividante siajn sciojn kaj ideojn cele al edukado de nova generacio pli konscia pri la pasinteco. La landa asocio do libere disponigu ĉiuspeciajn rimedojn por efektivigi projektojn, kiuj iel plifortigos ĝian “mikrosocion”, tiel ke ĉiuj, kiuj apartenas al ĝi, vere sentos Esperanton esenca parto de sia identeco. Jen la tasko kaj la celo.

1. Giordano, Alessio. “Inter movadoj kun sinkrona dimensio kaj mikrosocio kun diakrona retrospektivo” (Prelego el la KCE-simpozio “Horizontoj de la nuna Esperantio”, 1–4 Novembro 2024 en Ĉaŭdefono). *Literatura Foiro* 333, Feb 2025, 16–22 (parto 1). *Literatura Foiro* 334, Apr 2025, 114–120 (parto 2).
2. LF 334, 118–119.
3. LF 333, 22.
4. LF 334, 120.

La vivo de Peĉjo

ĉercoj • Timothy BORONCZYK



Baldaŭ eldoniĝos: *Centvorte*

libroj



Centvorte estas kolekto de cent cent-vortaj mikronoveloj, verkita de la portorika aŭtoro Jorge Rafael NOGUERAS kaj ilustrita de Ana Lobo CARVALHO. En la dua parto de la libro vi krome trovos kelkajn el liaj premiitaj noveloj kaj mikronoveloj.

Jen kion diras pri la libro Stela BESENYEI-MERGER, ties redaktisto:

Kial en la pasintaj kvin jaroj vi trovas la nomon de Jorge Rafael Noguerras inter la premiitoj de preskaŭ ĉiuj literaturaj konkursoj? Ĉu li vere estas tiom bona verkisto?

Legante “*Centvorte*” vi komprenos kial. Lia kreema menso konas nenian limon; buntaj roluloj, kiel malaperanta ombro, distros vin. Dank’ al li vi entuziasme ekŝatos la ĝenron de mikronoveloj. Se vi

atente legos, vi ankaŭ ekkonos la verkiston, Rafa. Ĉar malantaŭ la senkompataj murdoj vi trovos patron, kiu amegas siajn infanojn; fidelan amikon; bonkoran idealiston, kiu ĝoje ludas per la lingvo, kaj majstre elpensas la plej diversajn suspensojn.

Plezuran malkovron al vi!

Ĝi estos baldaŭ havebla ĉe eldonejo Mondial kaj aliaj libroservoj.

Krome, kongresantoj en Toronto ne maltrafu prelegon de Rafa pri la libro! Laŭ la horaro je presotempo, ĝi okazos je 09h30 dimanĉe, la 13-an de Julio en ĉambro ILC 100—sed kontrolu la aktualan horaron por esti certa!

Recenzo de *Centvorte*

libroj • Bill MAXEY

Ĉe la eldonejo Mondial baldaŭ aperos *Centvorte*, volumo, kies ĉefa kolekto “sendube helpas firmigi la enkondukon de la mikronovela ĝenro en la Esperantan literaturon”. Tion asertas en la Antaŭparolo la konata verkisto Liven DEK.

La aŭtoro de tiu grava verko estas la plurfoje literature premiita “Jorge Rafael NOGUERAS, Portoriko (Usono)”, kiel la ĵurioj kutimas anonci lian nomon. Jes, tre talenta aŭtoro kaj ankaŭ akademiano, sed por ni, li restas Rafa, nia afabla, amuza kaj aminda kunulo, kunlaboranto, podkastisto kaj instruisto.

En *Centvorte* debutas 100 fascinaj ekzemploj de la mikronovelo, bele difinita de Dek kiel “ege mallonga rakonto novece aranĝita, prezentanta simplan fakton, cele al ĝia facila asimilo”. En tiu ĉi okazo “ege mallonga” egalas precize 100 vortojn, limon kiun Rafa mem elektis kiel defion kaj disciplinon—kaj kiun li tre evidente sukcese respondis. La verkoj en *Centvorte* donas al la leganto iomete pli intiman rigardon en lian menson kaj samtempe atestas lian kompetenton kaj stilo kaj teknike.

Ĉiuj el ili estas juveloj, iuj pli brilaj ol aliaj—kelkaj vere ravaj—sed ĉiu kun sia efekto. La plimulto prezentas inĝenian intrigeton, kiu elnodiĝas frappe kaj ironie. Dum kelkaj sekundoj oni sentas momenton de ĝojo kaj samtempe ĉagreno, ekkonsciante pri la artifiko (tre simile al la efiko de sukcesa ŝerco). Tiel unu trafa frazo moketas la

fortegan kaj kompleksan reton el komunaj supozoj, de kiuj ni dependas por funkcii en la ĉiutaga vivo.

Kontraste, kelkaj rakontoj glate progresas de komenco ĝis fino, montrante sin foje eĉ kortuŝaj kaj memorigante nin pri la diversaj specoj de maljusteco en nia mondo. En aliaj okazoj la intrigo iel fontas el konvenciaj interhomaj aŭ familiaj rilatoj, kaj tiel reliefigas bazajn homajn emociojn kaj tendencojn.

La fekunda imago de Rafa ampleksas ĝenrojn de pura fantazio kaj magia realismo ĝis hororo kaj malutopio. Ofte rolas magio, superpovoj kaj alispecaj supernaturaĵoj. Multaj rakontoj dependas de fortaj negativaj emocioj, paranoj, malsano kaj frenezeco, kaj la morto en diversaj roloj. (La listo de murdiloj longas!) La lertaj finiĝoj tamen tuj forvaporigas la eventuale malhelan etoson. Kaj ne mankas tordita humuro.

Ĉiu “centvorto” memstaras, kun propra titolo; eblas do legi ilin unu- aŭ plur-ope, laŭhazarde, aŭ sinsekve, eĉ senhalte. Stile, oni rimarkas minimuman eksperimentadon, kaj la vortprovizo, kvankam bunta, inkluzivas malmultajn neoftajn radikojn. La lingvouzo estas senerara kaj la verkisto kreas sian efekton per saĝa ĵonglado de simplaj elementoj. Kompreneble, la 100-vorta limo neprigas la detaleman prilaboradon, kiun ĉiu rakonteto klare ricevis.

Kaj ĝuste pro tio la leginto povos pli profiti, ĉar malgraŭ tio ke la trukoj ne plu funkcias, la verketo restas modela, inda je zorga pririgardo de ties teknikaj detaloj. Kaj studentoj kaj verkemuloj povas utile analizi la elekton kaj faradon de vortoj kaj ankaŭ la sintakson.

Iom surprize oni ekscias, ke *Centvorte* estas efektive duobla volumo. Krom la debuta kolekto de 100 mikronoveloj, ĝi enhavas kiel bonuson ĉiujn (22) verkojn de Rafa ĝis nun premiitajn en diversaj konkursoj, inkluzive de la Belartaj Konkursoj de UEA. Aparte imponaj inter ili, la sep konvenciaj noveloj montras lian majstradon ankaŭ de tiu ĝenro. Oni trovas en ili inventemajn intrigojn kaj scenejojn kun plaĉaj priskriboj, atentokaptaj ruzoj, daŭra suspenso kaj ofte ironiaj finiĝoj. Pluraj el tiuj ĉi verkoj spegulas tradiciajn valorojn de la esperanta kulturo kaj aparte kontentigas la leganton.

En sia Enkonduko, Rafa skribas: “Mi esperas, ke ĉi tiu mia eta kontribuo al la Esperanta literaturo vin amuzos, pensigos, kaj eĉ inspiros al verkado.” Tion ĝi sendube faros. Ni ĝoju, ke unu el ni jam tiel rapide atingis tiom multan renomon; ni kunfestu per gratuloj kaj aĉetoj la aperon de *Centvorte*. Samtempe ni esperu ke Rafa, malgraŭ sia elstara sukceso pri la mikronovelo, ne laboros ekskluzive en tiu kampo sed esploros ankaŭ pli vastan terenon. Ni ja bonŝancas, havante la eblon sekvi de tre proksime la kurson de tiel promesplena kariero.

Ingo

senintenca esperantaĵo • Alison WITHONEL



Ĉu tason oni povas rigardi kiel *likvingon*? Ne, nepre likvujon; sed jen tio, kion oni vidas ĉe *Ingo's Tasty Food* en Arizono! Certe ekzistas iuj bongustaj manĝaĵoj, kiuj havas ingon... *Push Pops*?

Mikronoveloj

Paralela universo

Timothy BORONCZYK

Raĥelo vespiris, rimarkante sur la kalendaro sian noton pri “Paralela Universo”. Ŝia posteno en la estraro de loka esperanta klubo devigis ŝin partopreni, eĉ se vere ŝi ne volis. Raĥelo estis ĝisosta esperantisto — alivorte, ŝi estis seniluziigita mizantropo.

Sed iom poste, ŝi legis raporton en ĵurnalo pri trovita letero de Beaufront, en kiu li petis pardonon pri la skismo.

Ŝi rimarkis neantaŭrimarkitan libron sur la tablo titolitan “Gerda Aperis”.

Kiam ŝi ŝaltis sian radioaparaton, eksonis muziko de Persone.

Ĉio tiel surprizis Raĥelon, ke ŝi preskaŭ svenis (kaj falis)!

“Eble mi ĝuos la ĉi-jaran Paralelan Universon,” ŝi pensis.

Tiam eksonis vekhorloĝo.

Movimpeto

Alena ADLER

Ne indas rakonti, kiel li efektivigis sian tempovojaĝon — ne finiĝis bone. Kaj pri kial? Sufiĉas diri, ke li deziris akiri avantaĝon. Sentiĝis al li, ke ĉiuj konstante pluiris sen li. Iuj al sukcesaj karieroj, aliaj al geedziĝo, familio. Kaj ĉiujare, la ŝancoj al li rekapti sian movimpeton ŝrumpiĝis.

Do kiam venis oportuno vidi la estontecon propraspekte, li ne preterlasis la okazon. Unu aŭ du tagojn tie — nu, tiam — eĉ nur horeton, eble gajnus al li ian scion, kiu donus al li avantaĝon.

Do, ek —

Malvarmo! Nigro — vakuo ... kaj foraj steloj.

“Ho, ve,” li pensis. “Nun ĉiuj vere pluiris sen mi.”

Ŝtelisto

Su Fidler COWLING



La ŝtelisto forprenis de tabernaklo oran figureton de Avalokiteŝvaro, diino de kompatado, kiun li volvis en flanelo kaj enpoŝigis, elironte tra la fenestro. Li veturis transurbe, restigis la aŭton en strateto apud la rubejo. Li eniris domaĉeton tra fenestro, metis la figureton sur kuirejan tablon apud fandiĝinta kandelo kaj infana bildlibro. Li piediris al la ĉambro kie dormis triopo de lastenaskitaj beboj. Li zorge levis unu, volvis en flanelo, portis ĝin ekstere en unu el la bebportiloj. Revenante al la riĉa domo, li reeniris tra la fenestro kaj metis la bebon en la kolekt-ŝrankon kun noto: “La Egaligisto trafis denove!”



Karlo Pov ne plu kongresas kun ni

omaĝoj



I met Charley in 1978 during the preparation for the World Esperanto Congress in Varna, Bulgaria — he worked at the Headquarters of the World Esperanto Association organizing the events. When he entered the office of the Bulgarian Esperanto Association, upon seeing me, he hit his head on the door's frame — stricken from the first sight! We, several girls, started laughing... We worked together to solve endless problems, since the whole of Eastern Europe was at the Black Sea in August, and to accommodate 5000 Esperantists was a heroic effort.

We were good friends for several years, with special feelings on his side and not even a thought to leave ever Bulgaria on mine. But realizing how different he was from the other boys: devoted, intelligent, well-read, I started to change.

In 1984 I traveled to North America giving lectures about earthquakes (my field) at various Esperanto conferences in Los Angeles, Portland etc., which Charley helped to arrange. On the way to the Canadian consulate in Los Angeles to apply for a visa to participate in the World Esperanto Congress in Vancouver, someone shot at our car! I got the visa, and an enormous fright! I could not live in a dangerous country, and he would not move to mine. So, the things stalled. Some years later, I realized Charley was my destiny and I moved to US in 1990 as his fiancée.

Our wedding was as unusual as our story: Far from families and friends, we were married at the court at Ellicott City, then he took me to his favorite restaurant (Pizza Hut), ordered a big pizza for home, and we ate it

with a small bottle of Bulgarian champagne. I had my best dress, a red one (an ancient Bulgarian tradition), which shocked his clan.

Charley was one of the top well-read Americans, with deep knowledge of literature, history, science and culture. On our honeymoon to Florida to meet his granny, aunt and cousins, he took a book on quantum electrodynamics since he hadn't had a time to read it! Well, Disneyworld and excursions around Tampa prevented him to read, but with his cousin they went to check the bookstores around, and left me on the beach to bake as a red lobster. He always traveled with books and used any minute to read. And his book collection is enormous! He inspired me to write when I started to travel later and I published my book, in Bulgarian — too bad, he never was able to read it.


We were active members of the Esperanto movement in DC area. Charley retired at age of 60 using the opportunity of a buyout offered at the Department of Justice, where he worked as an economist for 29 years; also he started having health problems. He spent 13 years in the retirement of his dream, surrounded by lots of books, DVD movies, classical music (he was the last person to “play” on the piano of Beethoven — as a child his mother took him to the house-museum, he jumped under the rope and started working, the same night a fire broke out and the piano burned down).

He participated in discussions on a great scope of topics thanks to the Internet with friends far and wide. Home was his fortress. We gave each other some good scares: His sedentary lifestyle worried me that he was getting more and more sicknesses — I wanted him to be around for a long time, also I worried how I could have the strength to take care of him. On the other hand, my travels — mostly solo, far and wide in the world — certainly made him to worry about my safety, but I always sent emails from jungles, deserts, mountains, middle of Nile on a felucca boat (with a tour group) that I was OK and I would be back. He was always loving and supportive to me, with a good heart about others and great sense of humor.

I will miss him greatly!

RIP

– Daniela Power



Mi estas korrompita ekscii pri la forpaso de mia kolego kaj amiko Karlo Pov. Ni laboris kune en la Centra Oficejo en Roterdamo. Post la laborhoroj li regalis nin per multaj ludoj, kiuj refreŝigis nin. Pli dolorige estas scii, ke li suferis en siaj lastaj monatoj. Mi riverencas antaŭ lia memoro.

– Stefan MacGill

I first met Charles Power, or Karl Pov as I knew him, when I was in high school in the San Francisco area, and Charles had just been hired to run an Esperanto book service and information center in San Mateo that Cathy and Bill Schulze had previously operated out of their nearby home. From my perspective as a 15-year-old boy, Charles was living the dream life: He was living independently and speaking, reading and writing in Esperanto all day. On top of that, he was kind and generous, had a great sense of humor, and was extremely knowledgeable about everything related to Esperanto. He was my hero and I thought he had the perfect life.

Perhaps because of this, I remember being shocked one day when Bill Schulze told me that he was concerned about Charles. It seems that Charles did not have a lot of experience living on his own and had especially poor cooking skills, so he was eating macaroni and cheese almost every day. I was surprised for two reasons: First, eating macaroni and cheese every day actually sounded

pretty good to me, and second, it hadn't occurred to me that Charles could have any flaws. I don't know how this problem was ever resolved, if it was, but I do know that Charles eventually left us and went on to a very successful life and career in Europe (and eventually back in the US). Europe was very far away back then and I didn't have much contact with him in the decades since, but he never stopped being my hero. Ripozu en paco, amiko.

– Grant Goodall



In Esperanto, my friend called himself “Karl Pov” — or “Charles Power”, a pun on his name, which can also be translated “Charles Can.” He certainly could, and he certainly had power. He served his country for decades as a government official, most recently at the Department of Justice for many years.

He was my good friend for over half a century. I knew him mostly as a lifelong devotee of the international language Esperanto. He mastered this ingenious created language and joined its idealistic movement at a very young age and promoted it all his life.

He served as secretary of the Esperanto Association of Los Angeles, where I met him. Then he was hired as Permanent Convention Secretary of the Universal Esperanto Association based in Rotterdam, Holland. There he organized World Esperanto Congresses all over the world for many years. At his first such congress, in Varna, Bulgaria, he met his lovely future wife, Daniela.

Later he lived in Maryland for many years and contributed greatly to the Esperanto movement here in the DMV. Bringing Daniela here, of course, brightened all our lives as well as the local Esperanto community.

It takes a lot of strength, conviction and, yes, power to serve an ideal like that of Esperanto with such lofty goals, a massive challenge of a cause — that a language invented by one man in 1887 could become the second language for all mankind.

Karlo ja povis. Charles could. And did. With intelligence, creativity, dedication and humor — all of which you need when you're trying to help push the language of world peace and brotherhood up the Mount Everest of cynicism.

This poem by the Hungarian Esperanto poet J.N. Benczur comes to mind:

“Malsamaj Vidpunktoj”

Ni ĉiuj havas malsamajn vidpunktojn.
Niaj pensoj kaj kredoj malsamas,
Sed ni ĉiuj vivas kun amo.
La vivo estas senfina,
Morto estas nur malgranda paŭzo.
Niaj pensoj kaj kredoj malsamas,
Sed ni ĉiuj vivas kun amo.

[We all have different views.
Our thoughts and beliefs vary.
Life is endless,
Death only a brief pause.
Our thoughts and beliefs vary,
But we all live with love.]



When I think of Charles, I hear in my head an original Esperanto reggae song called “Dankon” — “thank you”. The refrain is:

“Mi volas diri dankon al miaj plej bonaj amikoj en la mondo” — “I want to say thank you to my best friends in the world.”

That song of course makes me think of Charles Power, and I thank him for being one of my best friends in the world.

In Esperanto, as in French, we don't say “goodbye.” We say instead, “Ĝis revido” — until we meet again.

Karlo, kara amiko, dankon, kaj ĝis revido.

— Jim Ryan

Kolofono

Usona Esperantisto estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 200–2000 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun via nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevatajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimataj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redakcio aŭ de Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al bulteno@esperanto-usa.org.

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en № 2025:3 estas la **15-a de Aŭgusto**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.

Redakcia teamo: Alena ADLER kaj Lua HALL.

Aŭtoroj

Matt Brooks

Mateo BROOKS ekstudis Esperanton en 2017 kaj pasie verkas poezion, kiun li lastatempe adaptas al kantoj per artefaritaj intelektoj kiel Suno. Li parolas kvar lingvojn kaj studas multajn aliajn per platformoj kiel Duolingo. Kun pli ol dek jaroj da sperto en estraroj de neprofitcelaj organizaĵoj kaj pli ol dudek jaroj en financaj kaj teknologiaj postenoj ĉe grandaj firmaoj, li kontribuas kiel Kasisto de E-USA per vasta scio kaj sperto. Liaj literaturaj verkoj haveblas ĉe blog.brooksny.net.

<matt.brooks@esperanto-usa.org>

RUTH "MARGO" KEVSS-COHEN

Ruth Ke vess-Cohen, konata ankaŭ kiel Margo en Esperantujo, estas emerita kuracisto loĝanta en Usono. Dum pluraj jaroj ŝi gvidis la teamon de volontuloj, kiuj kreis la Esperanto-kursojn ĉe Duolingo. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto kaj aktiva redaktanto de PIV (Plena Ilustrita Vortaro).

<ruth.ke vess-cohen@esperanto-usa.org>



Christopher JOHNSON

Christopher Johnson (CJ) estas program-inĝeniero, kiu loĝas en Raleigh, Norda Karolino kun sia edzino kaj du hundoj.



Bill MAXEY


Bill adoptis Esperanton kiel parton de sia identeco jam dum sia unua NASK, en 1994. Ekde tiam la esperanta kulturo diversmaniere pliriĉigas lian vivon. Li ofte (ĝoje!) legas, foje verkas kaj prelegas, kaj kutimas estri la programon de la ĉiujara Printempa Esperanto-Renkontiĝo (PER).

<billmaxey2@gmail.com>

Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.

<tboronczyk@gmail.com>



Krome kontribuis:

Amanda Higley SCHMIDT • Lua HALL • Alena ADLER • Kartero WILLIAMS • Brandon SOWERS • Alison WITHONEL
Su Fidler COWLING • Daniela POWER • Stefan MACGILL • Grant GOODALL • Jim RYAN

